



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Aŭgusto 2019 n-ro: 44



Merhaba,

Ĝuste Turka Stelo dergimizin 44.ŭncŭ Aĝustos sayısı.

13. Ortadoĝu Esperanto Toplantısı 2020 yılında 3 ve 6 Nisan tarihleri arasında Fethiye'de yapılacaktır. Fethiye Türkiye'nin güney-batı kesiminde turistik bir kasabadır. Yukarıdaki resimde Fethiye kasabasını, alttakilerde ise Kelebekler Vadisi ve Ölü Deniz'i görmektesiniz.

Hepinize iyi okumalar !



Saluton,


Jen nia aŭgusta kaj 44-a numero de nia revuo Turka Stelo.

La 13-a Mezorianta Esperanto Kunveno okazos en Turkujo inter la datoj 3 kaj 6 de aprilo 2020 en Fethiye. Fethiye estas turisma urbeto en la sud-okcidenta parto de Turkujo. En la supra bildo vi povas vidi la urbon de Fethiye kaj en la subaj estas la golfeto de la papilioj kaj la morta maro.

Bonan legadon al ĉiuj !



SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
La ĉasisto de sonĝoj	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
La nova estraro de UEA	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Neniu volas iĝi prezidanto de TEJO	4
Polyglot Gathering 2019 – la plej granda kaj riĉenhava	5
EKRA2019 - malnova romano	6
EKRA2019 - 1945	6
Poemoj de Venelin Mitev	6
Tempo Sigelita	7
AKONTIO kaj CIDIPA (AKONTIOS και KYΔΙΠΠΗ)	8
Historio de Sumoo en Japanio	10
Vivanta memoro de Jozefo F. fiŝisto en Koljur'	13
Maro	13
Fabeleto	13
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	14
Erotika Amletero	15
Ĉu mia tempo sufiĉas?	16
La sekreto	17
Fettes proponas buĉi la Centran Oficejon	18
Hans Magno ENCENSBERGO Poemoj	19
Ŝercoj	22
Kurcvortnigmo	22
Rabisto kaj Kampulo	23
Blogo de instruisto de Esperanto	23
El la libro de "Dao de Jing" (35)	24
Legi estas bone	24
En la tombo	25
La langoelŝovema fizikisto	28
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 15)	29
Kial mi maldungis mian sekretariinon	30
Ni Lernu Esperanton!	31
Facilaj rakontoj	32
Solvo de la krucvortnigmo	32

Kursoj



Finiĝis la kurso de Esperanto en la lernejo Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbul. En somero ne okazos aliaj kursoj.

Murat Ŭzdizdar pensiĝis el Ŭskŭdar Amerikan Lisesi lernejo, do ekde venonta jaro la ŝanco daŭrigi EO klubon en ĉi tiu lernejo, bedaŭrinde, estos malalta.

LA ĈASISTO DE SONĜOJ (Novelaro)

(Nova libro de Julian Modest)

En julio 2019 eldonejo "Libera", Belgio, eldonis la novelaron "Ĉasisto de sonĝoj" de Julian Modest. La libro enhavas 27 novelojn, kiujn la aŭtoro verkis dum la lastaj du jaroj. Legante "Ĉasisto de sonĝoj" oni nerimarkeble eniras mirindan mondon, riĉan je aventuroj, emocioj, esperoj kaj amoj. La aŭtoro spertas montri kaŝitajn sentojn, fortajn dezirojn, etajn ĝojojn, bonajn agojn. La herooj ravas per siaj pasioj. Ili strebas realigi siajn celojn en la mondo, kiu estas multkolora kaj multaspekta.

Same tiu ĉi libro, kiel iam skribis William Auld, pruvas, ke: "Julian Modest estas ege sentema observanto kaj lia psikologia kompreno de la homaj sentoj kaj motivoj estas trafa kaj profunda."



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La 59-a sumoo okazos en septembro. En julio ĝi ne okazos.

Nia retejo:

<http://www.esperantosumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_EsperantoSumoo

Internacia_EsperantoSumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

groups/759066970888217/?

fref=ts

UEA



N-ro 811 (2019-07-15)

La aprila-junia numero de Unesko-Kuriero aperas kaj UEA daŭre serĉas

sponsorajn organizojn per ĝi

La aprila-junia numero de Unesko-Kuriero estas publikigita de UEA kunlabore kun Unesko. La bita versio estas elŝutebla ĉe la retejoj de Unesko (https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000367693_epo), UEA kaj Unesko-Kuriero (<http://kuriero.esperas.info>). La papera versio haveblas ĉe la Libroservoj de UEA kaj de la 104-a UK. La sona versio estos elŝutebla ĉe la retejo de Unesko-Kuriero. Dum la 104-a UK en Lahtio, Finnlando, UEA donacos ekzemplerojn de la numero al reprezentantoj de ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj por ke ili vaste vidigu ĝin al la publiko. [...]

TEJO



Nova numero de Revuo Kontakto

La abonantoj povas elŝuti la

elektronikan version de la revuo.

Enkonduko de la redaktoro

Rogener Pavinski

“Jen via mondo, jen nia mondo, kun monta neĝo kaj mara ondo.

De la tropikoj ĝis la polusoj, jen vasta mond’ por ĉiuj ni.” [...]

Remalfermo de kandidatiĝoj por la TEJO-Estraro 2019-2020

La Elekta Komisiono de TEJO serĉas kandidatojn por la Estraro de TEJO, por oficperiodo ekde la 1-a de septembro 2019 ĝis la 31-a de aŭgusto 2020.

La kandidatiĝoj estas remalfermitaj ĝis la 10-a de julio 2019 pro malsufiĉo de kandidatoj por diversaj fakoj kaj oficoj. Momente plej necesaj kandidatoj por la ofico de: [...]

La nova Estraro de UEA

SO Jinsu , Orlando E. RAOLA , Fernando MAIA , Duncan CHARTERS , HUANG Yinbao , Jérémie SABIYUMVA , Aleks KADAR , Amri WANDEL.

Legu pli ĉe:

<https://www.liberafolio.org/2019/07/20/duncan-charters-nova-prezidanto-de-uea/>





Leteroj de niaj legantoj



Dankon por la lasta Turka Stelo (n°42) !
Mi aparte aprezis la poemon de Tagore "La Juna Princo". Ĝi estas elstara, grava, kaj tre bele tradukita. Mi malkovris ĝin de pluraj jaroj, kaj registris, kaj printis, kaj parkerigis ĝin.

Roland Platteau el Francio



Turka Stelo estas vere rekomendinda revuo en Esperanto kun kontribuajtoj el multaj landoj. Mia sola bedaŭro estas manko de kontribuajtoj el kaj pri Turkio mem, kio pravigus la titolon "Turka..."

Henri Masson el Francio

Neniu volas iĝi prezidanto de TEJO

-- el Libera Folio

Mankas kandidatoj por la plej gravaj postenoj en la estraro de TEJO. Por tamen trovi homojn kiuj pretos transpreni la taskojn, la asocio faris novan alvokon. Oni esperas, ke ene de semajno sin anoncos la estontaj prezidanto kaj ĝenerala sekretario de la asocio, kaj estraranoj pri aktivula trejnado, kongresoj kaj pri homaj rimedoj.

Komence de majo TEJO publikigis malferman alvokon por trovi novan prezidanton kaj novajn estraranojn. La interesiĝo tamen evidente estis magra – ĝis la limdato, la fino de junio, ne venis ajnaj kandidatiĝoj por la plej gravaj postenoj.

Post la paso de la limdato la alvoko estis renovigita. La nova limdato estas la 10-a de julio, sed ne tute evidentas, de kie ĝis tiam povos aperi kompetentaj kandidatoj, se ĝis nun ili ne sin anoncis.

Laŭ la elekta komisiono, ĝis la unua limdato alvenis sep kandidatiĝoj. Tion nome de la komisiono skribis Querino Neto en la reta diskutejo de la komitato:

– Ĝis nun estas 7 kandidatoj el 2 genroj kaj 4 kontinentoj inter la aĝo de 23 kaj 33. La kvanto ne abundas kaj por kelkaj oficoj kaj fakoj ankoraŭ necesas kandidatoj, tial la Elekta Komisiono decidis remalfermi la kandidatiĝon kaj petas vian helpon.

Daŭre mankas kandidatoj, kiuj pretas okupiĝi pri aktivula trejnado, kongresoj kaj talento (homaj rimedoj), dum supozeble sin anoncis kandidatoj, kiuj pretas okupiĝi pri eksteraj rilatoj, edukado kaj scienco, landa kaj faka agado, merkato kaj informado.

Aparte zorgige estas, ke mankas kandidatoj por la postenoj de prezidanto kaj ĝenerala sekretario.

En la Telegram-kanalo de TEJO oni proponis, ke la elekta komisiono raportu pri la jamaj kandidatoj por faciligi la trovon de taŭga kompletigo.

Reprezentantoj de la elekta komisiono tamen klarigis, ke informoj pri la kandidatoj estos publikigitaj nur post la paso de la nova limdato. Post tio la diskuto en la Telegram-kanalo reiris al pli kutimaj temoj: sekse neŭtralaj pronomoj kaj la aĉeco aŭ malaĉeco de McDonald's.

La malklara situacio en la estraro de TEJO daŭras jam de pli ol unu kaj duona jaroj, kun varia intenseco.



En decembro 2017 dum la komitata kunsido en Szczecin surprize anoncis sian demision la tiama prezidanto de TEJO, Enric Baltazar, post nur kvarmonata ofico.

Laŭ informoj tiam ricevataj de Libera Folio, Enric Baltazar rekomendis kiel sian posteulon la duan vicprezidanton de la asocio, Francesco Maurelli. Tamen la postenon de prezidanto ricevis nek Maurelli nek la unua vicprezidanto, Konstanze Schönfeld. Anstataŭe la estraro proponis al la komitato, ke la tasko de prezidanto estu transdonita al la ĝistiam ĝenerala sekretario, Hoan Tran Thi (Ĝojo).

En aŭgusto 2018 ŝi konsentis daŭrigi kiel prezidanto kaj estis reelektita, sed efektive ŝi poste ne multe aktivis en sia posteno kaj apenaŭ havis kontakton kun la komitato. Kaj ne nur ŝi: en februaro 2019 oni en la komitata diskutlisto de TEJO konstatis, ke nur duono de la estraro regule kontribuis al la cirkulero.

Post la diskuto du estraranoj anoncis sian demision, dum la prezidanto sendis pardonpeton pro sia malaktiveco. Aldone plia estrarano jam pli frue perdis sian postenon pro tio, ke li ne partoprenis en tri sinsekvaj retaj voĉdonoj.

En 2017 la mandatperiodo de la estraranoj de TEJO estis mallongigita de du jaroj al unu jaro. La ĉefa argumento por la mallongigo estis, ke junuloj ne povas plani sian vivon du jarojn antaŭen, kaj tial ne emas akcepti sindevigon por tiel longa tempo. Kontraŭuloj de la mallongigo argumentis, ke unu jaro estas tre mallonga periodo, kaj la daŭra serĉado de novaj estraranoj postulos multe da laboro.

Nun ŝajnas ke ambaŭ flankoj en la diskuto pravis. Unuflanke evidente eĉ unu jaro estas tro longa periodo por multaj estraranoj de TEJO, kiuj dum la mandatperiodo konstatas, ke ili tamen ne havas la necesan tempon kaj energion por la tasko. Aliflanke

efektive la serĉado de novaj estraranoj ŝajnas esti nefacila tasko.

Fonto: <https://www.liberafolio.org/2019/07/04/neniu-volas-igi-prezidanto-de-tejo/>

Polyglot Gathering 2019 – la plej granda kaj riĉenhava

-- el La Balta Ondo

La renkontiĝo Polyglot Gathering (Plurlingvula Kunveno) allogis fine de majo al Bratislavo rekordan kvanton de plurlingvemuloj. Entute 654 personoj el 67 landoj partoprenis ĝin.



Jam la sesan fojon okazis ĉi tiu evento, kaj, kio estas ĝojiga, ĉiujare ĝi allogas pli kaj pli da homoj (ĉi-jare venis je 116 homoj pli multe ol pasint-jare). Poliglotoj (plurlingvemuloj) evidente komencas malkovri sin kiel komunumon, intereso-grupon, movadon. Eĉ sen firmaj movadaj kaj organizaj strukturoj, sentebblas la emo renkontiĝadi kaj fari ion “utilan” kaj interesan por si mem kaj por aliaj poliglotoj. Tiel ja naskiĝis la Plurlingvula Kunveno, kiun efektive fondis tri esperantistoj kaj aliaj esperantistoj (ene de E@I) plu organizas ĝin.

Oni ne ŝokiĝu (estante ĝisosta esperantisto): la ĉefa komuniklingvo estas la angla! Sed... ĝi estas tie pro praktikaj kialoj – plej multaj poliglotoj nuntempe ja regas ĝin. Do por doni la gravajn anoncojn, aranĝi pagojn, sciigi pri manĝoj, programo, ekskursoj ktp oni uzas la anglan. Sed krome – ĉiuj poliglotoj venas al la renkontiĝo ĝuste por praktiki aliajn lingvojn! Ofte ili venas, ĉar ĉi tie ili trovas rarajn eblojn: a) renkonti “plurlingvemajn samideanojn”, kiuj samkiel ili ŝatas lerni diversajn (jes ja, eĉ tre ekzotikajn) lingvojn; b) aŭskulti prelegojn pri lingvo-rilataj temoj (ofte de famaj kaj prestiĝaj poliglotoj, profesoroj ktp.); c) praktiki siajn lingvojn; ĉ) pasigi tempon kune, renkonti malnovajn amikojn kaj/aŭ trovi novajn amikojn aŭ laborpartnerojn.

Jen do, estas multaj kialoj por veni al “Polyglot Gathering”! Ĝojigas la fakto, ke kutime ĉ. 20-25% da homoj parolas (ankaŭ) Esperanton! Do oni povas tie pasigi sian tempon tute trankvile ankaŭ uzante nian

verdan lingvon.

Ĉi-jare ankaŭ okazis pluraj prelegoj aŭ pri aŭ en Esperanto, oni povis viziti Aligatorejon, Gufujon, kulinaran festivalon ktp. Eĉ la plej juna preleganto estis esperantisto: la 14-jaraĝa Petro Fedosov el Moskvo. Same (jam la sesan fojon) okazis t. n. “Lingva defio” (Language challenge) – ĉi-jare pri du malsamaj lingvoj: la hinda kaj Esperanto. (Oni devas eklerni la lingvon sesdek tagojn antaŭ la aranĝo kaj dum la evento oni faras teston, kie oni pritaksas la nivelon de la lernintoj).

“Polyglot Gathering” havas por ni esperantistoj ege interesan historion – eĉ se ankoraŭ mallongan. Kun la ideo venis esperantistoj Chuck Smith kaj Judith Meyer en Berlino en 2014, kiam simila evento (Polyglot Conference) devis okazi en Usono, kaj oni ne volis atendi ĝis 2015, kiam ĝi eble revenus al Eŭropo. Oni do decidis okazigi en Berlino novan poliglotan eventon kaj titolis ĝin “Polyglot Gathering”. La unuaj tri renkontiĝoj okazis en la ĉefurbo de Germanio.

Sed pro kio ĝuste tiu ĉi evento iĝis tiom alloga kaj ŝatata de la komunumo de plurlingvuloj? Eble tio estas granda merito de la tuta koncepto, kiun Chuck kun Judith prenis rekte de la Esperanto-eventoj kaj agordis ĝin por la plurlingvula grupo. Ili sukcese transprenis plurajn sukcesajn aferojn de Esperanto-aranĝoj kaj enprogramigis ilin al tiu ĉi evento. Evidentiĝis, ke tio estis ĝusta decido! Tiel oni dum Polyglot Gathering povas trovi Gufujon, Aligatorejon, Interkonan vesperon, Kulinaran festivalon, plurlingvan koncerton de jOmO aŭ de aliaj esperantistoj ktp. Jen do, pruvo, ke nia Esperanto-mondeto povas esti alloga ankaŭ por la cetera mondo!

Ekde 2017 la renkontiĝon ĉeforganizas E@I, kiu uzas en sia oficejo Esperanton kiel laborlingvon. Plua videbleco (kaj aŭdebleco) de Esperanto dum la aranĝo do estas garantiita. Krome ni devas alte taksi la rolon de la Esperanto-organizoj, pretaj subteni la aranĝon. Ĉi-jare UEA denove estis subtenanto (sponsoro) de la Plurlingvula Kunveno kaj tiel grave helpas videbligi Esperanton en ĝi.

Kio pri la estonteco? La aranĝo ja havas evidente kreskantan potencialon. kaj ni, kiel organizantoj, emus utiligi tion. Venontjare ĝi okazos la 26-30an de majo en Teresin, proksime de Varsovio. Ĝi okazos sub unu tegmento, laŭ la stilo de ordinara Esperanto-

>> 15

Per ora nektaro de la fora stel' Misteron drinkigas ĉi brilega ŝtel': Flamis malkaŝe ĉe mi mia kor' Kaj nun ĝi forestas, Kaj nun ĝi forestas, Kaj nun ĝi forestas Sub prem' de l' rankor' .	Fandiĝis anima kiraso el ŝtal', Ĉi lokon plenigis malplena fatal'; Jam aliul' kun melasa grimac' Renkontas la damon Renkontas la damon Renkontas la damon Sur la venta plac' .	Stoplejon ornamas la buntneĝa stol', Kaj min pli okupas malvarm' de pistol' . Jen de mia sorto eta paraŝ': La vivon kaj morton La vivon kaj morton La vivon kaj morton Samigos la paŝ' .
---	--	--

Espopore

Evgenij Georgiev, el Kazahio

Ŝi ridetis, ankaŭ li ridetis, sed iliaj okuloj tristaj estis. Sian manon si levis kaj movigis, sed sia brako ege peza ŝajnis. Malproksime, al ŝi li mansignis.	Ĉi-tiu trista tage brilis suno, sed ili nek estis ĉe la plaĝo, marŝanta sur la sablo nudpiede nek kuris en la ondetoj ĝoje, kaj ne laŭde ridis brakumante.	Staranta tie, silente, ŝi spektis, Monstran ŝtalan balenon foriri, Sian koramikon forkondukti. En ĉielo ridmevoj brue ludis, Sur sia vango, tiam larmo fluis.
--	--	---

Ksilokopo

Cyril Vergnaud, el Tajvano

KVIETA AMO NE EKZISTAS


Kvieta amo ne ekzistas.
Finfine vi komprenu tion.
Vi vane ploras kaj insistas,
ke ni tuj sanĝu senkompate ĉion,
pro kio jam delonge tristas:
banalajn miskomprenojn kaj hezitojn,
konfuzojn, koleriĝojn, malkonfidojn,
disputojn vanajn, ofte bruajn,
ĵaluzojn efemerajn, sed enuajn...

Ĉu vere kredas vi je am' simila -
kvieta, sentumulta kaj humila?
Mi dubas, kara, ho, mi dubas forte
kaj estas konvinkita mi ĝismorte,
ke ĝi ekzistas nur en la romanoj
kaj en banalaj filmoj-melodramoj.

La veran amon ĉiam akompanas
ekstazoj, emocioj ardaj,
atakas ŝtorme ĝi kaj brile flamas
dum noktoj ampasiaj tardaj.
Survoje ĝi detruas ĉiujn barojn,
haltigojn, malpermesojn kaj kialojn,
ĝi la moralon falsan tondre spitas
kaj ĉiam la liberon elmilitas!

ĜIS KIAM JUNAS VI

Ĝis kiam junas vi,
ĝis kiam via sango bolas,
ĝis kiam vi pri l' mond' scivolos,
veturu,
avanturu,
petolu, enamiĝu,
ĵaluzu kaj disiĝu,
disputu kaj skandalu,
insultu kaj batalu,
sed ne forgesu, ke la tempo
kruele sagrapidas.
Kaj ne forgesu ankaŭ,
ke survoje
ne plu revenos
kio pasis foje.



verkis kaj sendis Venelin Mitev el Bulgario

LA MARA LUPO (SEA WOLF)

Mi faros nur demandojn en ĉi tiu artikolo. Mi ne enkondukos vin al la filmo. Mi resumos.

Ĉu Kapitano Wolf Larsen estas nur diktatoro?

Kial la ŝipo nomiĝas “Fantomo”? u i estas koŝmaro en kiu Humphrey Van Weyden troviĝas? Ĉu ĉi tiu ŝipo estas transformiga revo?

Ĉu Kapitano Ahab kaj Kapitano Wolf (Lupo) estas tute aliaj karakteroj ol la aŭtoritata komprenemon, kiun ili reprezentas?

Ĉu la ŝipo estas metaforo de la mondo?

Ĉu Wolf Larsen estas nur ficcia karaktero? Ĉu li povas esti tiel senkompata viro kvankam li interesiĝas pri poezio kaj filozofio?

Ĉu “La Mara Lupo” estas tragedio tiel potenca, kiel “Moby Dick” ?

Ĉu nigra-blankaj filmoj (same al tiu produktita en 1941) estas pli fidela al la spirito de la romano, ol tiuj koloraj filmoj produktitaj en la jaroj 1993, 2006 aŭ 2008?

Ĉu vi ŝatus gajni sperton sur ŝipo same al Humphrey Van Weyden, alfrontante la kruelan aspekton de la vivo? Aŭ ĉu sufiĉus resti nur “spektanto”?

Ĉu vi iam spektis Christopher Reeve-on en tia malsimila komponaĵo ol “Superman”?

Ĉu ankaŭ Charles Bronson konvene portretis la karakteron same al Edward G. Robinson?

Dio mia, kial vi benis Jack London kun nur 40 jarojn da vivo? Ĉu li estis stelo, kiun li volis brilegi nur por mallonga tempo? Ĉu li nun estas “interstela vojaĝanto”?

Kial la ina karaktero de la romano, la verkistino Maud Brewster, ne estis portretita en la unua filmo?

Ĉu vi legis la Maran Lupon?

Ĉu vi legus ĝin denove?

Ĉu vi estas unu el tiuj librovermuloj, kiuj ignoras kinon?

Ĉu vi estas unu el tiuj, kiuj ĝuas ambaŭ romanojn kaj ĝiajn filmo-adaptaĵojn?

Ĉu vi iam vojaĝis per ŝipo? Se jes, ĉu vi iam pensis, ke dum ia ŝipo-akcidento via vivo povus subite ŝanĝiĝi draste?

Denove, mi “plonĝas en la kino-ekranon por verki filmon pri maro”.

Adiaŭ nun! ...

verkis **Konuralp Sunal**
25 julio 2019, Büyükkada, Turkujo




(1941)



(1993)



(2008)



(1973)



(2006)




(2011)

Akurataj legantoj de helenaj mitoj sendube jam scias, ke preskaŭ ĉiam, inter la ĉefaj roluloj de ĉiu historio estas la eroto!

En la magia lando, nomata Helenujo, naskiĝis multo plej valora por la homa penso, spirito, travivado. Multaj eble pensos pri demokratio, filozofio, scienco k.a., tamen mi emfazas la poezion, la muzikon kaj la eroton!

Oni prave kontraŭdirus, ke eroto estas nek elpenŝaĵo, nek kreitaĵo homa, ĝi estas impulso fizika, naskita kune kun la homo. Tute ĝuste, tamen en Helenujo tiu fizika impulso estis de la dioj mem majstre flegata, manipulata, kultivata, protektata, mi ne trovas la taŭgan verbon por diri, ke tiu, fontanta el la instinkto, precipa forto, estis reguligata kaj prizorgata de la dioj, Ĉefa regulatoro de la afero estis, kompreneble, la subluma, plej amata diino, Afrodita (Αφροδίτη), kiu transformadis la krudan, bestan instinkton kaj montradis al la homoj la vojon al la plej bela kaj plaĉa manifestiĝo de la sensoj kaj la spirito, do, al la amoro! La diino kontroladis la am- kaj seks-vivon de la homoj, ŝi zorgis pri la konstanta vekigo de ties libido, sed samtempe de ties plej delikataj amsentoj. Ĉiuj dioj, duondioj, ĉiaj diaĵoj, ĉiuj herooj, enmiksiĝis en sennombrajn, senfinajn amaventurojn, kaj per sia ekzemplo helpis la homojn, senhezite, senĝene, senrimorse ĝui la vivon.



Mi diras ĉion tion ĉi, ĉar mi estas preta, ankoraŭfoje rakonti belan amhistorion kaj mi pensas, ke kelkaj legantoj eble opinios, ke tiaj historioj estas mia propra obstineco. Do,

mi ekspliku, ke tia estas plejparte la helena mitologio, kreita en la daŭro de jarmiloj, de la libera helena penso, de homoj gajaj, kiuj ĉiam ĝuis la plej belan naturon, brilan sunon, serenan, lazuran maron.

Nu, estis junulo nomata Akontio, kiu naskiĝis kaj vivis en la malgranda insulo Ceo (Κέα). Li apartenis al riĉa kaj nobela familio, devenanta de la glora gento de Mino (Μίνως aŭ Μίνωας). Akontio estis junulo bela, bonkondata kaj tre afabla, tiel li estis tre amata en sia propra patrujo; li estis tre inteligenta kaj sprita viro,

tamen, samtempe li estis modera, modesta, iom hontema kaj tiuj ĉi liaj ecoj igis lin ankoraŭ pli simpatia kaj amata al ĉiuj liaj konatuloj kaj sampatrianoj.



Ĉiujare, en Deloso (Δήλος), la sankta insulo de Apolono (Απόλλων), okazis tuthelena, granda, kelk-taga religia festo, kermeso oferata al la granda dio de la lumo, de la poezio kaj artoj. La festadon partoprenis precipe la Ionianoj (Ιωνες), loĝantoj de Cikladoj (Κυκλάδες), la insuloj ĉirkaŭantaj la sanktan naskiĝlokon de Apolono. Tie, okazis diversaj ceremonioj, ritoj, privataj kaj publikaj sanktoferoj, diversaj procesioj, sed ankaŭ amuzaj aranĝoj, artaj kunvenoj, dancoj, fiaro kaj aliaj tradiciaj eventoj. Tiun grandan aranĝon kutime partoprenis multaj Ceanoj, inter kiuj estis ankaŭ Akontio kaj ties familio.

En Nakso (Νάξος), la bela insulo, unu el la plej pitoreskaj Cikladoj, loĝis la familio de Ceikso (Κύηξ), viro nobla, riĉa, devenanta de malnova reĝa atena gento. Ankaŭ tiu eminenta familio el Nakso kutimis partopreni la grandan, jaran solenadon en Deloso.

La jaron, en kiu okazis la historio, kiun mi rakontas, por la unua fojo Cidipa akompanis siajn samfamilianojn al Deloso. Kaj Cidipa estis la plej juna filino de Ceikso, belega virgulino, malavare dotita de la dioj per ĉiaj plej valoraj virinaj ecoj kaj karakterizaĵoj. Ŝi estis tre bela, ĉarma, je ĉio plaĉa, bonkora, ĝentila kaj, precipe, modesta kaj pudora.

Cidipa, kun entuziasmo sekvis siajn gepatrojn kaj gefratojn al la granda festo, ĉar por la unua fojo ŝi faris vojaĝon ekster sia patroinsulo, do, tiu estis ŝia unua "aventuro". Tiel, dum sia kelk-taga restado en la sankta insulo, plena je scivoleco, rigardeme ŝi vagadis en la interesaj lokoj de la delosa centra templo kaj ties ĉirkaŭaĵoj, kompreneble ĉiam akompanata de sia propra, fidela, kaj certe sendorme atentema servistino-vartistino.

Same trankvile, senzorge, kun gaja, distra humoro, partoprenante la ritojn, tamen ankaŭ sin amuzante, kun amikoj kaj parencoj. Unu momenton, kiam li pasis antaŭ sanktejo, lia rigardo falis sur junulinon, kiu eniĝis en ĝin. Fakte, estis nur momento, tamen Akontio ekopiniis, ke antaŭ li pasis brila, belega diino, eble vizio, certe ia ekstermonda estaĵo. Li staris kvazaŭ fulmobatita; ŝajnis al li, ke, subite, ĉio ĉirkaŭ li eksilentis, ke ĉio malaperis, li iom staris senmova kaj tuj poste li kuris en la templon. Li staris ĉe la enirejo kaj tuj, surprizite, ravite, per la okuloj tute malfermitaj,

kaj kun la koro en freneza batado, konstatis, ke estis nek halucino, nek iluzio sed nur blank-vestita, eksterordinare bela junulino, kiu, kliniĝinte antaŭ la altaro, preĝis serene.

Tio, kion en nia tempo ni nomas “fulma enamiĝo”, en la helena antikveco estis konata, sed tre bone eksplikita. Do, tute simple, la petola ĝojoplena kaj ĝojodona dio, Eroso (Ερως), la filo de Afrodita, celis kaj per sia senerara amordona sago, trafis tute ĝuste la koron, en tiu ĉi okazo la koron de Akontio kaj la junulo tuje estis neresanigeble enamiĝinta.

Jes, ekzakte tio okazis, tie, en la templo, kie la pudora Cidipa, kun pietato preĝis al la honorata dio. Kaj jes, vi tre bone komprenis, estis ja la bela Cidipa tiu splenda junulino, kiu senvole, sciante nenion, iĝis la objekto de tia, subita, tiom flama ampasio de Akontio.



La junulo staris iom malproksime, kaŝite en la duonlumo de la sankta loko kaj per flamantaj rigardoj, avide ĝuadis la ĉarmon kaj belon prezentatajn antaŭ liaj okuloj. Li deziris, li deziregis,

tamen li ne povis alproksimiĝi al ŝi, li ne aŭdacis fari la paŝon, ni jam diris kiom hontema kaj timida li estis. Li ne sciis kion fari, sed tuje trafis lian menson ideo, sendita de la sama petolema dio, ideo stranga, neeksplikebla, kiun tamen Akontio, en plena konfuzo tuj kontentigis. Li kuris ekster la templon, li eniĝis en la sanktan parkon de la diino Artemisa (Ἄρτεμις) kaj li deŝiris grandan, tute ruĝan granaton. Poste, per sia tranĉilo gravuris sur la frukto la frazon: “mi ĵuras al Artemisa, ke mi edziniĝos kun Akontio”, li revenis en la templon, denove li staris malproksime, kaŝite en ombra loko, kaj li nur puŝjetis sur la plankon la granaton, kiu ruliĝis kaj haltis ĝuste ĉe la piedoj de Cidipa. La junulino, sentinte la bateton de la frukto sur ŝiaj ŝuoj, sin klinis kaj kun miro prenis la granaton. Ŝi tuj konstatis, ke io estis skribita sur ĝi, kaj ĉar ŝia servistino demandis ŝin kion ŝi rigardas tiom atente, laŭtvoce ŝi legis: “mi ĵuras al Artemisa, ke mi edziniĝos kun Akontio”. La du virinoj komprenis nenion, iom ili

diskutis pri la stangaĵo, sed post nelonge ili forĵetis la frukton, ili tute forgesis la aferon, kaj senzorge daŭrigis sian promenadon.

Nur tio okazis, Cidipa foriris sciante nenion, Akontio, pro manko de kuraĝo lasis ŝin foriri, li restis sola, malĝoja, malfeliĉa! Nur tio ja okazis, sed ni notu, ke iamaniere iu ĵuro estis donita!

Pasis tempo kaj ĉar la proponoj estis multaj, kaj ĉar Cidipa estis jam edziniĝopova fraŭlino, ŝia patro elektis la plej taŭgan kandidaton kaj decidis ŝin edziniĝi. Ĉio en la domo de Cidipa estis longe en febro, en la ordinara, viva, ĝoja ekscitiĝo de la preparado de brila nupto. Tamen, kiam ĉio estis preta, la antaŭtago de la geedziĝo, Cidipa subite malsaniĝis. Estis okazo stranga, sed tre serioza, ĉar la invititaj plej kapablaj kuracistoj povis nek kompreni, nek ekspliki la nekonatan malsanon de la junulino, kiu estis longe en tre malbona stato. Kompreneble, la nupto estis prokrastita, en la hejmo la ĝojon anstataŭis profunda malĝojo, la tuta familio estis maltrankvila, ĝis kiam, same subite kaj mirakle, Cidipa tute resaniĝis.

La nova dato de la prokrastita nupto estis difinita, la lastaj preparoj estis plenumitaj, ankoraŭfoje ĉio estis preta, tamen, la antaŭtago de la geedziĝo, Cidipa denove, subite malsaniĝis, tiun fojon ankoraŭ pli serioze. Ŝi perdis la konscion, ŝi falis en ian lipotimian staton, kiun la kuracistoj ne povis ekspliki. Tiun fojon, la stranga malsano daŭris pli longe, sed iam, same subite malaperis kaj Cidipa estis denove tute sana, freŝa, bela kaj, sekve, preta edziniĝi.

Estas superflue diri, ke la trian fojon okazis la samo, la junulino ankoraŭfoje malsaniĝis, sed tiun fojon, ŝia patro, Ceikso, komprenis, ke tio ne estas normala, ke io mistera okazas, ke io mistera malhelpas la edziniĝon de lia filino. Li decidis eltrovi la kialon de la malfeliĉo trafinta lian hejmon, do, li mem iris al Delfoj (Δελφοί), al la templo-divenejo de Apolono kaj petis orakolon de la dio. La ricevita respondo tiun fojon estis nek nebula nek dusenca, ĝi estis tute klara: “Cidipa ne povas edziniĝi kun la elektita viro, ĉar ŝi faris jam tre pezan ĵuron al Artemisa, ke ŝi edziniĝos kun Akontio”. Kaj la dia orakolo, ne kiel ordinare konciza, donis al la malfeliĉa patro ankaŭ informojn pri la glora deveno, pri la bona karaktero kaj la fakultoj de la nekonata Akontio.

Ceikso revenis hejmen tre kolera pro la nekompreneble malbona konduto de lia filino. Li tuj alvokis ŝin kaj minacante ŝin per severaj punoj, postulis ekscii kie kaj kiam ŝi konatiĝis kun tiu Akontio. Cidipa, prorante protestadis kaj persiste neadis, ke ŝi faris tian maldecaĵon. Tamen, oni ne povis pridubi la dian orakolon, kaj la indigninta patro decidis pri la plej pezaj punoj, decaj al la tiom granda peko de lia filino.

>>12

Historio de sumoo en Japanio

Venis al s-ro Hori Jasuo bona ideo de esperanta sumoo antaŭ dek kaj kelkaj jaroj. Laŭ lia propono, multaj esperantistoj en la tuta mondo ĝoje partoprenas en ĝi. Ankaŭ mi!

Tamen mi dubas, kiel la partoprenantoj scias pri Japana sumoo. Mi havas intereson en la granda sumoo(japane Oozumoo) de mia infaneco. Mi volis skribi la artikolon por ordigi mian scikonon pri ĝi. Mi komencas unue de la historio. Mi atendas vian respondon!

Antaŭ dankon!

Kacu MATOBA

Antaŭ Edo-epoko ĝi ĉefe okazis kiel la festa ceremonio aŭguri la rikolton de ĉi jara terproduktaĵo.

En la Edo-epoko(p.k.1603~1867), ĝi estis organizita kiel spektaklo por kolektado de mono, kiu estis necese por konstrui templojn aŭ jaŝirojn, do ĝi estis dirita kiel kvesta sumoo. En la jaro 1624, ĝi estis unue aranĝita en Sasa templo (Edo, nuna Tokio). Sed, ĉar multaj konfliktoj pri batala decido kaj eblecoj de la forta ligecko kun senmastra samurajo, la ŝoguna registaro ofte prohibiciis la sumoon de la jaro 1648.

Tamen ĉe la Meireki-Brulego en la jaro 1657, multaj temploj kaj jaŝiroj estis forbruligita, kaj necesis multaj monoj rekonstrui ilin. Alifranke multaj sumoistoj perdis ilian vivtenadajn rimedojn por sia vivo, do sociaj malpacoj elvokis. Tial en la jaro 1684, la ekzekutivisto pri Ekleziaj Aferoj permesis fondi sumoorganizadon kiel profesion, kaj remalfermi la monvarban sumoon.

Poste la spektaklo okazis neregule en la diversaj lokoj en urbo Edo, kaj de la jaro 1744 okazis kvar foje po unu jaro en ĉiuj sezonoj. De tiam la sumoo ŝanĝis de monvarbeco al vivtenadeco. Plie artofajraĵo ankaŭ estis samtempe aranĝita kun la sumoa spektaklo de la jaro 1733.

En Edo-epoko, tiam imperiestro restis en Kioto kaj multaj grandaj komercistoj loĝis en Oosaka, kaj ili tenis multajn sumoistojn. Do la sumoo fariĝis multe pli vigle en Kioto aŭ Oosaka ol en Edo.

Tamen, en Edo, Tanikaze kaj Onogawa recevis la licencon de jokozuno(la titolo aldonita al la plej forta lukuisto) de sumoskolestro, Josida Oikaze. En la jaro 1791, sukcesis la sumoado antaŭ ŝoguno, Tokugawa Ienari, kaj de tiam sumoo en Edo prosperis helpite de la debuto de Raiden Tameuemon(venkoproporcio: 0.962). Baldaŭ, oni diris "La reala sumoisto devas sumoi en Edo".

Alifranke ĉiu jare okazis regule unuigaj spektakloj de sumoistoj en Edo, Oosaka kaj Kijoto. En la lastaj

verkis kaj sendis Kacu MATOBA el Japanio

jaroj de la ŝoguneco, ankaŭ estis aranĝita la matĉoj de sumoo kun aliaj sportoj (lukto kaj boksado). Kiam la usona mararmea admiralo, Matthew C. Perrj, venis en la jaro 1853 per Nigrasipo al Japanio kiu estis sinfermanta antaŭ la cetera mondo dum pli ol 200 jaroj, la administrantaj reprezentantoj de la sumoo proponis al la gardejo la kunlaboron kune kun kontraŭbarbarismo, oni diras. Tiam, la usonajn soldatojn surprizis sumoistoj tre facile transportinte pezajn rizajn pajlsakojn (ĉirkaŭ 60 kg).



Meiji kaj Taiŝjo-epoko (p.K.1867 1924)

Laŭ la Restaŭro de Meiji kaj kultura civilizacio en la jaro 1871, la ordono "Malpermesu Nudadon!" en Tokio kondamnis sumoistojn al mon- aŭ skurĝ-puno. Ankaŭ elvokis la diskuto aboli sumoon. Sed la krizo povis esti evitita pro la klopodado de la Tennoo Meiji, kiu ŝatis sumoi, kaj Ito Hirofumi(posta ĉefministro), kaj pro la sumoado antaŭ Tennoo. La sumoisto en la okazo estis la 15a jokozuno, Umegaja, kiu rekordis 58 senpaŭzajn venkojn (la 3a rango en la sumoa historio ĝis nun). Tial la sumoo estis oficiale agnoskita.



En la jaro 1907, Hitacijama iris al Usono por unue prezenti sumoon al eksterlandanoj.

Je la 2a de junio en la jaro 1909, la unua konstanta sumoejo estis konstruita en Rjogoku, Tokio. Paralele, la sistemoj kaj reguloj por sumoo estis bontenitaj kaj modernigitaj. Jen malpermeso de monĵeto, enturniro de sumoisto en ceremonia kostumo, reguligita vestado de juĝisto, abolo de standardo kaj stakigo de sakeabarelo, kaj enkonduko de la rivalado inter oriento kaj okcidento ktp. De la jaro 1923, la sumoa sesio estis plilongigita de 10 al 11 tagoj. En la okazo de la sumoado antaŭ la Princo Hirohito(posta Tennoo Ŝoŭa), la princatrofeo(nuna tennoatrofeo) estis farita per la degna dono. De tiam, la lasta viktinto ricevas la trofeon kune la ĉampionaŝildo.

Ĝis la fino de la 2a mondmilito en Ŝoŭa-epoko(p.K.1925 1945)

En la jaro 1927, Granda Japana Sumoa Asocio estis fondita post la malorganizo de Tokia- kaj Osaka-Sumoj Asocioj. La regula turniro okaĝigis kvar foje po unu jaro en ĵanuaru(Tokio/Rjogoku), marto(Osaka), majo(Tokio), kaj oktobro(Osaka) dum 11 tagoj ĉiu foje. De la jaro 1928, komencis la radioelsendo de sumoo kaj la adopto de reluktsistemo aŭ redukto de matĉo sen rezulto.

En la jaro 1937, la nombro de regula turniro ŝanĝigis al 13 tagoj ĉiu foje okaze de jokozuno Futabajama, kiu rekordis 69 senpaŭzajn venkojn(la unua rango en la historio ĝis nun). Plie, de la jaro 1939, la turniro estis okazigita dum 15 tagoj, kiu ne ŝanĝigis ĝis nun. La 2a mondmilito donis grandan influon sur la sumoejo, sumoistoj kaj turniroj.

Post milito (p.K.1945)

De la jaro 1953, la marta turniro estas okaĝigita en Osaka prefektuja gimnastikejo.

En tiu tempo, jokozuna kaj Administra Komisionoj fonditaj admonas ĉefdirektoron de Japana Sumoa Asocio pri la diversaj problemoj en sumoo. Ankaŭ televido(NHK) komencis alsendi la sumoon al tuta Japanio.

En la jaro ĉirkaŭ 1958, aperis jokozuno Totinisiki kaj Ŭakanohana. La novembro kaj julia turniroj estas nove okaĝigita en Fukuoka kaj Nagoja, respektive. De tiam entute ses turniroj estas okaĝigita en Japanio po unu jaro, kiu ne ŝanĝigis ĝis nun.

En la frua jaro de Heisei(1989~), jokozuno Tijenofuĵi kaj aliaj jokozunoj sinsekve retiriĝis. Post jokozuno forestis mallonge, aperis la gigantaj sumoistoj de Havajo, jen Konisiki, Akebono, Musasimaru, kaj sekvis multaj sumoistoj de Futagojama trejnejo, kie estis du fratoj de Ŭakanohana kaj Takanohana kiel la centraj sumoistoj, kiuj sukcesis havi multajn adorantinojn. Oni diris la tendencon kiel Ŭaka-taka-n bumon. De la jaro 1993 ĝis 2000, la kvar jokozunoj(Akebono, Musasimaru, Ŭakanohana kaj Takanohana) arde interbatalis. Takanohana gajnis 22 foje ĉampionecojn, kaj estis kvalifikita la Eterna Administranto.

De ĉirkaŭ la jaro 2000, la sumoistoj de Mongolio anstataŭis la Havajanoj. Ili sumois rigardante rapidecon kiel gravan. Jen estas Asaŝorju, Hakuho, Harumafuĵi, kaj Kakurju. Jokozuno Asaŝorju rekordis superregis tutajn turnirojn en la jaro 2005 unue en la sumoa historio. Jokozuno Hakuho rekordis 63 senpaŭzajn venkojn en la jaro 2010(la dua rango en la historio ĝis nun), kaj renovigis la nombrojn de

ĉampionecoj al 42 fojoj en la jaro 2019. Nun lia venkoproporcio estas 0.828. Li havas jam 34 jarojn, sed estas atendata renovigi la rekordojn. Plue du mongolianoj, Harumafuĵi kaj Kakurju gajnis la jokozunoan titolon. Ankaŭ alilandaj sumoistoj, Kotoouŝju el Burgalio kaj Baruto el Estonio, brile aktivadis.

Kaj nur Kisenosato kiel Japano gajnis la titolon de jokozuno en la jaro 2017.

Kiam la vera turniro ne okazis, la grupo de sumoistoj iras multa foje al ia loko en Japanio kaj faras unu tagan sumoan publikigon. La kontakto de sumoistoj kun lokaj adorantoj al sumoo kontribuas al disvolviĝo de sumoo en tuta Japanio.

Alifranke, ĝis nun 13 fremdlandaj publikaj prezentadoj okazis.

(Jaro: Lando: Loko)

1965: Sovetunio: Moskvo kaj Ĥabarovsko,

1973: Ĉinio: Pekino kaj Ŝanhajo,

1981: Meksiko: Meksik-urbo,

1985: Usono: Nov-Jorko,

1986: Francio: Parizo,

1990: Brazilo: Sao-Paŭlo,

1991: Britio: Londono,

1995: Aŭstrio: Vieno,

1997: Aŭstralio: Melburno kaj Sidnejo,

1998: Kanado: Vankuvero,

2004: Koreo: Seulo kaj Busano,

2004: Ĉinio: Pekino kaj Ŝanhajo,

2005: Usono: Las-Vegaso.

Ili estas farita invitite de fremdlando kaj aŭspiciite de la Japana Sumoo Asocio. La celo estas kompreneble la publikiĝo de sumoo al fremdlandoj, plue amikeco kaj intimeco kun fremdlandanoj. Oni nomiĝis sumoistojn kiel nudambasadorojn.

Krom tio, estas aliaj fremdlandaj turneoj de sumoo. Ĝi estas aŭspiciita de la impresario de tiu loko. La historio estas malnova ol la fremdlanda publika prezentado. Ĝis nun 16 fremdlandaj prezentadoj okazis en la sekvantaj landoj.

(Jaro: Lando: Loko)

1962, 1964, 1966, 1970, 1972, 1974, 1976: Usono: Honolulu,

1981: Usono: Sanozeo kaj Los-Anĝeleso,

1992: Hispanio: Madrido, kaj Germanio:

Duseldorf,

1993: Ĉinio: Honkongo,

1993: Usono: San-Joseo kaj Los-Anĝeleso,

2006: Tajvano: Tajpeo,

2008: Mongolio: Ulanbatoro,

2013: Indonezio: Ĝakarto.

Dum longa historio, la granda sumoo estis iom post iom reguligita, rafinita kaj stilizita. Ĝi niveligis la formon

kiel sporton, kaj fariĝis la propra tradicia kulturo de Japanio.

Estas videbla rekte en la granda sumoo, la ceremonioj de ĉefsumoistoj, la tabeloj, ornamaj vestoj kaj matĉoj de sumoistoj, kiuj ne ŝanĝiĝas de Edo-epoko. La sumoo, kiu enradikiĝas en japana kulturo kaj vivas kune la popola vivo, havas multajn flankojn en la historio, kulturo, diservo, kaj konkurso ktp, kiuj

havas ĉiuj aparte profundajn faktorojn.

Ĝi ne tute povas vidi en televido. Bonvolu veni al la sumoa domo kaj korposenti la longan kulturon de sumoo.

La gradaro kaj kvalifiko de sumoisto, kaj la sumoa areno estos poste skribita se eble.

verkis kaj sendis **MATOBA Kacu** el Japanio

9 >>



La ĝis tiam feliĉan kaj ĝojoplenan familion subite kovris, preskaŭ funebra, mallumo, la virinoj ploradis, la viroj ne sukcesis deteni sian koleron, neniu povis kompreni, kiel la plej juna, plej amata filino, kiel la ĉasta virgulino povis tiamaniere hontigi la tutan familion.

En tia etoso, ĉiuj en la domo estis konfuzitaj, tamen la maljuna servistino de Cidipa, kiu ĉiam akompanis la junulinon kaj pro tio ŝi estis jam kondamnita de la mastro al puno tre severa, pro timo, sed precipe pro sia granda amo al la junulino kiun ŝi ĉiam prizorgis, povis konservi sian memregecon kaj klopodis, kiel eble plej metode rememori ĉiujn vizitojn, promenadojn, ĉiun eliron el la domo. Tiele, ŝi atingis ankaŭ la forgesitan jam familian vojaĝon al Deloso, kaj, jes, ŝi ekmemoris la okazintaĵon en la templo, la trovitan granaton, kaj jen, ĉio estis magie eksplikita!

La senkulpeco de la junulino estis pruvita, la rido kaj ĝojo revenis en la feliĉan domon, ĉio estis eksplikita, sed la ĉefa problemo ne estis solvita, ĉar neniu konis tiun Akontion, neniu sciis ion pri li, certaj estis nur la informoj pri la deveno, la karaktero kaj la kvalito de la juna viro, donitaj de la divenejo. Ceikso povis nenion fari, krom serĉi pri respondoj en Deloso. Li sendis tien respektindan parencon, kiu senrezulte demandis ĉie, kaj fine sin turnis al la respondeculoj de la centra templo, la organizantoj de la granda jara festado oferita al Apolono kaj Artemisa. Tie, en la listo de la junuloj partoprenintaj la solenan liturgian dancon, registrita ankaŭ kiel signifa oferanto de la

templo, estis iu Akontio, nobelo el Ceo!

Dume, Akontio, reveninte al sia patrujo, falis en malfeliĉon. Li ne povis forgesi la vizian bildon de la bela junulino, kiun li jam amis pasie, ekscese; li ne povis pardoni al si tion, ke li ne aŭdacis proksimiĝi, ke li ne parolis al ŝi, ke li lasis ŝin foriri kaj preni kun si lian koron. Akontio sciis, ke li estis perdinta por ĉiam ĉian esperon pri feliĉo, do, li restis silenta, malbonhumora, moroza,

malfeliĉa. Al siaj gepatroj familianoj kaj amikoj diris nenion, li rifuzis doni ian ajn eksplikon pri sia stato, do, ekde tiu fatala vojaĝo al Deloso sur lian hejmon, sur unu ankoraŭ hejmon falis neeksplikebla malfeliĉo. Same kiel en Nakso, tiel ankaŭ en Ceo du familioj travivadis la saman dramon, ĉiuj estis maltrankvilaj, malgajaj, senesperaj kaj nur la tiklema Eroso observadis ĉion kaj tutkore ridadis, amuziĝis kaj atentis!

Li atentis la momenton, en kiu, en Ceo, oni frapis la pordon, la momenton en kiu oni anoncis ke fremdaj vizitantoj deziras nepre paroli al Akontio pri urĝa kaj tre serioza afero!

Jes, tre ĝuste vi ĉiuj komprenis ke ĉio estis mirakle solvita, ke la vojo al la feliĉo de du amindaj junaj homoj estis malfermita! La ĝojo revenis, Akontio kaj Cidipa kuniĝis en brila, dibenita nupto, la geedzoj ĝuis bonan, harmonian, ĝojoplenan kaj longan vivon, ili akiris gefilojn, ili akiris genepojn, do, la fino de la historio estas ankoraŭfoje feliĉa!

Kaj la instruo? Mi opinias, ke oni povus pensi, ke por tute ĝui la feliĉon, por ĝui ĉion bonan, oni devas antaŭe gustumi malfeliĉon, ekkoni la malbonon. Kompreneble, estas, povas esti, multaj ankoraŭ opinioj!

--- el GEMOJ EL LA HELENA HISTORIA KAJ MITOLOGIA TREZORO

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo

Revenante de Koliur' la tagon plej longan de l'jaro,
 tiom malsufiĉa por paroli kun novamiko.
 Mallertaj estas ni, viroj, spite la promeson ekvidinta en l'akvon de l'rigard'.
 Fiŝkaptajo tiom proksimas, sed tiom malmulte ni kaptas.
 Fuĝemaj riĉaĵoj, kujn interŝanĝi oni ne sukcesas.
 Malheligitaj koroj pro tiom da doloraj navigoj
 Koroj sekretaj, pli malfacile logeblaj ol fiŝoj.
 Vane la marplaŭdoj de l'pasea nokto klopodas reteni l'vagonaron,
 sterniĝanta en malrapida mateno.
 Jam tiom malproksimaj de l'ekluma renkonto estas ni.
 Forportitaj en la ĉiutagaĵojn, sen certeco reveni.
 Sed por ĉiam la rememoro de tiu viro kiel obstina klingo,
 en kaŝita loko de l'koro vundos min per vundo,
 kia estas rektanimeco,
 ekmirinda.



*(france : Collioures en Rusiljono)

poemo de **ANDRÉ FRÉNAUD** el Francio
 tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

MARO poemo de Klara Ilutoviĉ

Varme paciga pejzaĝo,
 Maro salutas bonvole
 le melodi' de adaĝo,
 Korkaresanta konsole.

Ĝojas pri akvo sunplena
 le l' festa punco papavo.
 Antaŭ belego serena
 Brilas okuloj en revo.

De la natur' malavaro.
 En suna lum' l' ondokanta
 Verda senlimo de maro,
 Kiel esper' vigliĝanta.

poemo de **Klara Ilutoviĉ** el Rusio
 sendis **Lenke Szász** el Rumanio
 photo de **Lenke Szász**



FABELETO poemo de Elvira Lippe

Gnomo paŝis en arbaron,
 Grizan havis li hararon,
 Muske verdan la ĵaketon,
 Funge ruĝan la ĉapeton.

Fabeletojn en korbeto
 Portis li por sciureto.

Gnomo paŝis kaj laciĝis.
 Li laciĝis kaj sidiĝis
 Sur la molan, varman teron,
 Sub la verdan juniperon.

Korbon li en manoj tenis, –
 Nun silente dormo venis.

Je rezin' aer' odoris,
 Pego frapis, gufo ploris...

La korbeto renversiĝis
 kaj fabeloj elverŝiĝis.

Fonto: <https://cezarkulturo.blogspot.com/2018/11/elvira-lippe-fabeleto-rimpoemo.html>



**Boulton: Subtila arto, sincero kaj humanismo
(1924-2017)**

*Mi estas tri. La digna lektorino
kun krajon' kritika libron legas.
En nigra robo, pri la origino
de l' dramo primitiva ŝi prelegas.*

*Dume, en koro, primitiva dramo
okazas, ĉiam freŝa kaj terura;
sub nigra robo brulas nun pro amo
virino simpla en dezir' tortura.*

*La lektorino pensas. La virino
baraktas, krias, nur angoron sentas.
Sed la Poet', per arta disciplino,
observas ilin ambaŭ, kaj komentas.*

Antaŭ kvin jardekoj aperis libro de poemoj pli intense personaj, pli rekte intimaj ol ĝis tiam aŭdiĝis en serioza poezio en Esperanto. La poeto estis 31-jara angla virino, jam verkinto de poemplibro en la angla lingvo, diplomito pri literaturo ĉe la fama Oksforda Universitato, tiam lektoro pri la angla en virina kolegio kaj ĝia vicedestro. Ŝia nomo estas Marjorie Boulton.



Tiu poemplibro, Kontralte, estas eksterordinara en diversaj sencoj. Ĝi estas nekutime ampleksa, 273 paĝoj. Ĝi estis plejparte verkata en nur unu jaro, 1953, nur kvar jarojn post la esperantistiĝo de la poetino. Ĝia lingva esprimado estas rekta kaj senpretenda, sed samtempe mature plena kaj sencoriĉa. Kaj antaŭ ĉio: neniam tiel abunde pruviĝis la liberiga potenco de Esperanto en persona esprimado kiel en tiu ĉi unua libro de la angla poetino.

Ĉi tiu aserto bezonas komenton. Esperanto ne tiom dependas de lingvaj kutimoj kaj kliŝoj kiel la naciaj lingvoj. Kaj ne nur tio: kiel transnacia lingvo ĝi ankaŭ ebligas liberiĝon el tiuj nevideblaj katenoj, kiuj pli-malpli akompanas la medion de la naciaj lingvoj. El tio sekvas, ke serioza poeto povas senti sin pli libera kaj pli sekura por esprimi siajn plej intimajn sentojn kaj pensojn per la Esperanta vorto. Kaj precize tian impreson oni havas legante multajn el la poemoj de Marjorie Boulton.

En Kontralte Esperanto fariĝis esprimilo, kiu liberigis la emociojn de la poetino serve al plej fidinda

prezento de ŝia personeco. En ĝia enkonduka poemo, citita supre, titolita La Triopa Memo, ŝi prezentas sin mem, la tri esencojn de sia personeco: la intelektan, la emocian kaj la artan. Kvankam tiel tri-dividita, ĉiuj tri ŝiaj "memoj" neniam estas strikte limigitaj en ŝia abunda verkaro, iliaj reciprokaj influoj estas ĉiam konstateblaj. Ŝia vortaro esprimas sentojn samtempe personajn kaj komun-homajn.

Tio estas tuj konstatebla en la unua sekcio de Kontralte, kiu konsistas el 28 sonetoj pri la spertoj de la poetino kiel lektorino kaj vicedestro de virina kolegio. En la arta versformo de la sonetoj ŝi priskribas ne nur siajn proprajn sentojn kaj pensojn, sed ankaŭ tiujn de la junulinoj, kiel ŝi partoprenas iliajn zorgojn, kritikis iliajn eseajn taskojn, aplikas siajn aŭtoritatajn devojn. Ĉiam oni perceptas ŝian profundan kunsentemon kaj deziron helpi kaj subteni la junajn animojn. Ĉu io komparebla estas trovebla en iu nacilingva literaturo, mi ne scias, sed mi emas kredi, ke tia profunda kaj arta raporto pri la vivo de instruisto en rilatoj kun siaj lernantoj estas io unika.

Sama varmkora sinteno, esence virineca, konstateblas ankaŭ abunde en la dua poemplibro de la poetino, titolita Eroj (1959), kiu estas eĉ pli ampleksa ol la unua (349 paĝoj). Marjorie Boulton havas ja vaste malfermitan fenestron al la mondo, kie akraj observoj iras man-en-mane kun varma humaneca kunsentemo. Ŝia temaro estas vasta, ŝia kreopovo multidimensia, subjektiveco kaj objektiveco bele ekvilibras.

Neniel eblas inde priskribi la verkistan karieron de Marjorie Boulton en mallonga artikolo. Ŝiaj grandaj poeziaj libroj tie okupas plej altan lokon, sed ŝi verkis abunde ankaŭ novelojn, teatraĵojn kaj eseojn. Ŝi verkis gravan anglalingvan biografion de Zamenhof, kies Esperanta versio aperis en 1962. Ŝi multe okupis sin pri instruado de Esperanto, ŝia progresiga legolibro Faktoj kaj Fantazioj (1984) estas eksterordinara trezoro de variaj legaĵoj taŭgaj por plivastigi la vortostokon kaj mondrigadon de la leganto.

Marjorie Boulton estas unu el la plej produktivaj kaj ŝatataj verkistoj en la internacia lingvo. Ŝiajn literaturajn verkojn ecigas subtila arto, sincero kaj humanismo. Kaj per siaj edukaj verkoj ŝi scias instrui per idea riĉo kaj amuzi per ĉiam ĉeesta sprito.

de **Baldur Ragnarsson**

Artikolo verkita por la revuo Juna Amiko, n-ro 110, 2004

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/boulton.html>

Mia knabineto,
Mariĝinta estas hodiaŭ la Egeo.
Same ankaŭ mi.

Hieraŭ antaŭ ol mi sukcesis ĉetablĝi,
telefonaŭvoko enkondukis min malsupren al la
ŝiphaveno.

Je la sepa, kiam ni forvelis, mi ne povis piediri pro
mia laceco.

Mia konsolo estis la via «horo». *

Mia bedaŭro estis, ke mi ne sukcesis regi eĉ por
nur unu momenton la mirindan maran karenon, la
vian korpon.

Pro malkuraĝo kaj noviceco mi levis la ruĝan
signalon de senregeco.

Hieraŭ mi multfoje vidis la knabinon de la pruo:

Tiun figuron kun la senorda hararo,
malheliĝantan, ploremantan.

Ŝi kvazaŭ por la unua fojo kredanta je la morto de
granda Aleksandro, kies tamen la kartagena kovraĵo
restis same brilanta.

Kun lia aŭtokrata pelerino.

Ruĝo de pompeja «Rosso romano», porfirkoloro
de Damasko.

Veluro, kiu kovras sanktan kalikon.

Sala oceana ŝelo.

Profunde ruĝa vino, kiu gloras la kristalon.

Vundo de tranĉilo ĉina.

Fulmo.

Acidcerizkolora sunsubiro.

Kandeleĝo de mia kredo.

Malferma signo de mia amo.

Sonĝo kaj nutraĵo de mia frenezeco.

Mi vin brakumas.

poemo de **Nikos Kavvadias** el la greka literaturo

tradukis **Vasil Kadifeli** el Turkujo

Nikos Kavvadias (1910-1975)
estas moderna poeto, verkisto kaj
maristo profesie. Li uzis siajn
vojaĝojn tra la mondo, siajn vivon
kaj adventurojn en la maro, kiel
potencajn metaforojn pri la eskapo
de ordinaraĵoj al ekster la limoj de realeco.



Ĉirkaŭ la fino de sia vivo, Nikos Kavvadias, enamiĝis
al juna virino, nomita Teano Suna.



Temas pri unu el liaj amleteroj, kiujn sendis la poeto
al ŝi.

* Plej eble "tempo" anstataŭ "horo". Kiam Kavvadias
estis 20 jaraĝa li enamiĝis al 50 jaraĝa virino. Poste
en sia maljuneco, pli precize kiam li estis 65 jaraĝa, li
enamiĝis al juna virino, fakte filologo, 25 jaraĝa. Do
lia konsolo estas eble tiuj reciprokaj aĝoj.

5 >> renkontiĝoj oni kongresumos kaj tranoktos en la sama
konstruaĵo (tio tamen validos nur por unuaj 300
aliĝintoj, por la sekvaj ĉ. 400 estas aranĝitaj
plurnivelaj hoteloj).

La renkontiĝo eble komencos "vagadi" tra la
mondo (aŭ almenaŭ Eŭropo) kaj baldaŭ povos iĝi
iaspeca "Universala Kongreso de Poliglotoj". La
potencialo estas, emo organizi ĝin same – do
espereble ĝis revido kun vi, kara (plurlingvema)
leganto, dum iu el la sekvaj Plurlingvemulaj kunvenoj!

Pli da informoj (angle):

<https://www.polyglotbratislava.com>

Peter Baláz (Petro)

E@I-kunordiganto, PG-organizanto

Fonto: **La Balta Ondo** <http://sezonoj.ru/2019/07/slovakio-27>

Ne estas tio ke ni havas tiom malmulte da tempo sed ke ni perdas tiom. . . La vivo kiun ni ricevas ne estas mallonga sed ni faras ĝin tiel; ni ne estas malbone provizitaj sed uzas kion ni havas malŝpareme. – Seneko la Juna



Ŝajne ĉiutage mi plendas pro la foresto de tempo. Ankaŭ la homoj ĉie ĉirkaŭ mi plendas tial. Eĉ antikvaj homoj plendis tial kaj pro tio la supran citaĵon skribis Seneko antaŭ ĉirkaŭ 2.000 jaroj.

Ĉu mi vere plendas senkiale? Ĉu mi havas sufiĉe da tempo?


Kiam mi rigardas la vivon sincere, mi rimarkas ke mi malbone uzas la tempon. Mi spektas senvalorajn filmetojn en Jutubo. Mi rulumas senĉese tra la novaĵlisto de Fejsbuko. Mi legas artikolojn kiam mi

aŭskultas podkaston kiam mi verkas kaj tiel nek memoras ion kion mi legis aŭ aŭskultis nek finis kion mi skribis.

Mi perdas tempon tagon post tago. Mi devas ĉesi tion. Mi devos esti pli konscia pri tio kion mi faras. Mi devos pensi pri tio kaj taksu kion mi faros. Ĉu ĝi havos valoron aŭ ne? Ĉu morgaŭ mi estos malfeliĉa pri tio kion mi faras hodiaŭ?

Mi ne volas forigi ĝojojn de la vivo. Mi volas forigi sopirojn pri la vivo. Mi ne volas forigi la plezuron. Mi volas anstataŭigi la plezuron per la feliĉo.

Kial mi volas vivi pli tiel? Ĉar vere sen tio mi pensas ke mi ne eĉ vivas.



Mi ne povas dubi la veron de tiu diraĵo kiun la plej bona poeto donis kiel orakolo: “La parto de la vivo kion ni vere vivas estas malgranda.” Ĉar la resto de la ekzisto ne estas la vivo sed nur tempo. – Seneko la Juna

Fonto: <https://priioajn.wordpress.com/2019/04/09/cu-mia-tempo-suficas/>

Simple, li sciis nenion por fari. Al kiu li rakontu, al kiu li parolu?! Al kiu li havu tiel multe da fido por elvolvi la enigmon, enfermita de li longajn jarojn, kvazaŭ en rustiĝinta kesto, kiu bezonus apartan ŝlosilon por malfermiĝi. En ĉiuj ĉi demandoj por si mem, rezultiĝis precize ke lia edzino estis la plej proksima kaj plej fidinda homo, al kiu li povus sin esprimi kaj eligi tiun lanbulon, peniganta lin longajn semajnojn. Sed, lia ĝeno nun estis kiamaniere aldiru ĝuste al Selvete tion, pro kiu li tenis tiun sekreton tiom da jaroj.

Vedat ne povis plu atendi kaj, tiun nokton, turniĝinta en teruran ansion, li parolis. Finfine li parolis. En la unua horo post la noktomezo, kiam kutime ili surmetis kovrilojn al la okuloj kaj al la pasigita tago, li, per la fingroj de la dekstra mano, estis malpeze tuŝinta ŝian hararon kaj la ties bruston. Per mallaŭta voĉo, li estis antaŭdirinta ŝin ke li havis ion por sciigi, ion, pri kio li ne kuraĝis ŝin aldiri antaŭe. Ŝi estis vizaĝturnita al li kaj pretpretis okule kaj orele vidi kaj aŭskulti.

Ju pli multe li rakontis, des pli honteme ŝi alrigardis lin. Vi ne povas imagi kiom multe li tremis kaj voĉe malfortiĝis rakontante, ke li, kontinue, plutenis

amrilatojn kun Igbale, lian unuan amatinon, konitan en lia naskiĝvilaĝo, kiu samtiel estis edzinigita ie en profunda rando de nia lando. Ili estis freneze enamiĝintaj unu la alian dum ilia frua junaĝo, sed la familioj malebligis ilian kuniĝon, ĉar iliaj prapatroj estis intermortigitaj, pro akvofonto troviĝanta meze de iliaj bienoj. Li transpasis facilmaniere la disiĝon de la unua virino kun kiu li eksentis sin masklon, sed ŝi estis tion grave travivinta. Ne ĉesis ŝi ami lin.

Post la edziniĝo, ŝi malrapide ekamis sian edzon, kvankam la menso apenaŭ disiĝis disde Vedat, kun kiu ŝi estis konceptinta ankaŭ filon, kiu post du semajnoj fariĝus dekkvin jara. La filo estis fariĝinta nun la tenilo kiu ligis ilin poreterne. La afero de lia filo, kiun li estis vidinta nur du fojoj tre mallonge, filo neniam rekonis lin kiel vera patro, fariĝis la ĉefa malkvieto de la profesoro.

Selvete, post la tuta ĉi rakonto fare de sia edzo, estis skuita tute, estis travivinta profundan ĉagrenon en la koro kaj ne povis paroli iun vorton en tiu malvarma nokto de januaro, kiu frostigis la tegmenton de ilia domo.

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

<<<

Rakonto de Adil Olluri, el Albanujo

Vedat Azemi, la hieraŭan vesperon, akre kvereliĝis kun sia edzino, Selvete. Tiel akre, tiel malestime kaj arogante ambaŭ alparolis unu la alian, ke, kiu ajn aŭdinta ilin, pensus kaj kredus ke ilia kunvivado finiĝus ĉivespere.

La kvindekunu jara viro vivis kun kvardeknaŭjara virino, ekde dudek ses jaroj. Ili interkonatiĝis en la koridoroj de la fako de la albana beletro, atendante la rezultatojn de la juniaj ekzamenoj, ŝi tiujn de la dua grado, dum li tiujn de la kvara jaro. Sufiĉis unu demando ŝia pri la nomo de nova profesoro kaj, ekde tiu momenteto, komenciĝis ilia senfina akompanado, kroniĝinta per geedziĝo kaj nasko de du filinoj, kiuj nun transpasis dudek jarojn kaj estis mirinde belaj, ĉiu pli ĉarma ol la alia. Neniu el ili havis plej etan deziron por sekvi la samajn studojn kiel iliaj gepatroj, kvankam ilia patro estis jam profesoro ĝuste tie, kie li estis iam mem studento.

Dudekkvar unuaj jaroj de la komuna vivo ilia estis harmoniecaj, amplenaj kaj respektplenaj, sen ia ĝenaĵo aŭ luktaĵo kiu efikus en ilia feliĉo. Ili havis la amon kaj la emocion de la unuaj tagoj, eĉ en ilia aĝo, kiu, por multaj, apenaŭ konsideriĝus amaĝo. Ili havis ankoraŭ junecan intimecon, malgraŭ tiom da jaroj pasigitaj kune, kaj multaj, pri tio povus diri ke, post tiu tempo ĉe geedzoj la sentoj nature cedas al la rezono, eĉ povus esti tiaj kiuj pensus ke, en tia aĝo, por la edzo kaj la edzino la sola emocia rilato estis la infanoj.

Sed, ĉe la profesoro Vedat kun Selvete la afero estis tute alia. Ŝajnis ke ili estis tenintaj ian fadenon inter si, kiu neniamfoje estis fleksita, aŭ ian puran vinglason, kiun neniamfoje ili lasis malplena, eĉ restu duonplena. Estis tio ia bona sorĉo, kiu neeksplikeble estis teninta ilin tiel, kvazaŭ ligitaj en forta kverka branĉo, kiun neniu venta ŝtormo povus faligi. Ne influis ankaŭ la fumo de la preparolaĉoj ĉirkaŭ la flirtoj de la profesoro, forkaptinta la tutan urbon, kaj kontinue oni pridiskutis ĉirkaŭ ili, kvazaŭ la homoj ne faris alian konservacion. Pri ili parolis, je miro, plej multe la homoj sin nomantaj verkistoj, kiuj pri libroj preskaŭ neniam interparolis.

La famo de Vedat kiel piĉfikulo ege furoris kaj unu kozo tro ĉagrenigis lin, ne ĉar lin malhelpis sia malmoraleco, mitiĝinta de maliculoj, kaj ne ĉar li strebis ke ili konsideru lin virtan homon, sed kiel verkisto, li deziris ke la homoj pli multe parolu pri liaj

romanoj, kiujn ili povis tuŝi kaj tralegi kaj ne pri kozo, kiujn ili ne estis vidintaj kaj eble ne povus vidi iam ajn. Sed la maliculoj ne cedis kaj li ĉesis pensi pri ili.

Antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj, estis tiel multe disvastigitaj la onidiraĵoj pri la flirto lia kun la blonda studentino, Suzana, de la kvara grado, kiel tiuj atingis la orelojn de sia edzino. Selvete apenaŭ deziris aŭdi pri tio, ankaŭ tiam, kiam tion estis aldirinta ŝin ankaŭ mem siaj fratinoj, kiuj kontinue insistis ke ŝi devis klarigi tiajn kozojn kun sia edzo, sed ŝi apenaŭ malfermis la buŝon pro tio. Ŝi fidis al la edzo kaj, je nenia prezo, ne deziris rompi la komforton, lastlaste ne pro afero, kion oni atribuis kutime preskaŭ al ĉiuj profesoroj.

Tiel, ŝi, kiomfoje aŭdis tiaĵon, ŝajnis la surdulon kaj daŭrigis per siaj laboroj, samkiel dum la aliaj ordinaraĵoj. Vedat estis por ŝi la aŭtenta idolo kaj heroo. Lia figuro estis grandioza en ŝiaj okuloj kaj koro, aparte post la problemoj kaj aborto de la tria gravediĝo, kio, post operacio, finiĝis malsukcese per abortiĝo de la sesmonata bebo, ekspektita alveni en ŝia vivo. Sed, la plej doloreca de ĉi tiu aborto estis la definitiva raporto de la kuracisto, kie oni skribis ke ŝi ne kapablis plunaski. Estis tio la plej terura novaĵo ricevita de ŝi dum la tuta vivo, kio profunde estis skuinta ŝin. Tia travivaĵo ŝia okazis en la oka jaro de la geedziĝo kaj estis ĝuste ŝia edzo kiu kuraĝigis ŝin kaj motivigis ŝin rekapabliĝi. Li havis neekzemplecan senton por ŝi, traktante ŝin kvazaŭ diinon, kvazaŭ estaĵon, kiu neniam devus ĉagreniĝi per vortoj, nek per malĝojoj, pro ne maturaj agoj.

Selvete, lia prudenta kaj nigrabarara buklulino, estis kvazaŭ ikono, al kiu la kredanto, post peniga labortago, preĝis dumvespere.

Iun malvarman januaran nokton, antaŭ du jaroj, la profesoro sentis en si ne travivitan ĝenon, Estis tio, io kvazaŭ kulposento, peniginta lin dum multe da tempo, sed lastajn du semajnojn, li estis tro ĉagrenita pro tio. Li tenis sekreton dum dekkvin jaroj, kion li konfesis al neniu. Tiu sekreto, tiel intima kaj tiel dezirebla por li, tiel grava por lia vivo, kiu neniel devus malkaŝiĝi, estis la kozo kio, lastajn tagojn penigis lin preskaŭ ĉiutage, tamen ne konfesante al iu ajn. Lian spiriton estis kaptinta dilemo, plej granda en la sia vivo, skuanta lin ĉiutage. Paroli aŭ ne paroli?!

Tio malkvietigis la profesoron, ĉe kiu komenciĝis blankiĝi la haroj. Li estis konvinkita ke nenio inter la Tero kaj la Ĉielo povas resti nemalkovrite, sed li timis paroli ĉar pensis ke ne rezultiĝus bone por li.



Fordonaci la bibliotekon, fermi la libroservon, luigi la domon en Roterdamo kaj movi la reduktitan oficejon al malpli kosta lando. Jen ideoj de Mark Fettes por savi UEA-n de minacanta katastrofo. "Mi tute ne estas feliĉa kiel oficanto de la entombigo de la Roterdama UEA, ĉar tiu entombigo estas la sigelo de la malsukceso de mia generacio de aktivuloj", diras Renato Corsetti.



Vido al Nieuwe Binnenweg el la Centra Oficejo.

La jam efektivigitaj tranĉoj en la Centra Oficejo tute ne sufiĉas por resanigi la ekonomion de Universala Esperanto-Asocio, konstatas prezidanto Mark Fettes en raporto sendita al la komitato de UEA sojle de la Universala Kongreso en Lahtio.

Por tio laŭ li necesas eĉ pli drastaj paŝoj: parte aŭ tute luigi la domon en Roterdamo por gajni monon, movi la Centran Oficejon al malpli kosta EU-lando, fordoni la unikan bibliotekon Hodler kaj liberiĝi de la malprofita libroservo.

La nun prezentita raporto komplete malkongruas kun la strategia plano de UEA, kiu estis la publika programo de Mark Fettes je lia prezidantiĝo en 2013. Laŭ tiu plano aktiva membrovarbado devis esti unu el la strategiaj prioritatoj de la asocio. "Celo de 10%-a jara kresko donus mezurilon por la sukceso de tiaj iniciatoj", la laborplano aldonas.

Evidente tiu "strategia prioritato" ne havis prioritaton dum la estrado de Fettes. Aktiva membrovarbado apenaŭ okazis, kion oni povas konstati laŭ la mezurilo starigita en la laborplano mem. En 2013 UEA havis 4.903 individuajn membrojn. Se ĉiujare la membraro, laŭ la celo starigita en la plano, kreskus je 10 procentoj, ĉi-jare la kvanto devus superi 8.600.

Efektive tamen eĉ ne klaras, ĉu la kvanto de individuaj membroj en 2019 atingos 4.000, kaj evidente ĝi ne multe superos tiun ciferon. Tio cetere neniel estas mirinda, konsiderante la drastan altigon de kotizoj en la pli riĉaj landoj, samtempe kun la nuligo de la presita Jarlibro.

enspezoj de UEA venas ĉefe de kotizoj kaj kongresoj, dum la elspezoj iras ĉefe al salajroj de la oficistoj kaj kostoj de la Centra Oficejo. Ĉar la membraro ŝrumpas, necesas tranĉi la servojn eĉ pli draste ol jam estis farite, li konkludas. Tion oni laŭ li povus fari movante la oficejon al malpli kosta lando en Eŭropa Unio.



Unuavice konsiderindaj laŭ Fettes estas Kroatio, Ĉeĥio, Slovakio, Pollando kaj Litovio. "Alternative, UEA povus gardi sian sidejon en Nederlando, sed limigi siajn dungitajn laborfortojn tie kaj utiligi kunlaborantojn kiuj loĝas diverslande kaj kunlaboras ĉefe elektronike", la raporto aldonas.



Mark Fettes parolas dum komitata kunsido en Lisbono.

La Strategia Laborplano siatempe ellaborita sub la gvido de Mark Fettes male akcentas la "fundamentan rolon" de la oficejo.

"Multaj aspektoj de la 'komunuma vivo' de UEA dependas de la organizaj kaj kunordigaj fortoj de la CO", konstatas la laborplano. Por allogi pli da membroj la asocio laŭ la laborplano devus interalie renovigi la servojn, plivastigi la libroservon kaj sisteme reklami la agadon de UEA.

Aldone UEA devis laŭ la laborplano de Fettes starigi "Centron por Kultura Evoluigo", kiu kunlaboru kun la Centra Oficejo pri la evoluigo de servoj al la komunumo. Plia strategia prioritato estis la kompleta renovigo kaj modernigo de la retejo, por kiu la komitato en 2013 donis 100.000 eŭrojn.

El tio estis realigita nenio. Por la reteja modernigo ja estis elspezitaj 35.000 eŭroj, sed sen rezulto. Nun UEA laŭ la freŝa raporto transdonis la taskon de reteja renovigo al "nova teamo kunmetita de TEJO" kaj esperas havi novan retejon ĝis la fino de 2020.

En sia raporto Mark Fettes konstatas, ke la

Nenijaj decidoj estas faritaj, sed la raporto de

>>21

Hans Magno ENCENSBERGO *
(Hans Magnus Enzensberger)

Poemoj

Antaŭe
por Guntero

Ho jes, la spirito! Antaŭe ĉiam
temis pri ĝi. Mi demandas min,
kio ĝi fariĝis, la spirito.
Ankaŭ la trajneto
jam delonge ne plu tintas.
La malriĉulo estas for,
al kiu la patrino donis monerojn,
envolvitajn en peco da gazeto,
kaj teleron da supo.
La popolricevilo¹ estas for,
la pantalonpinĉilo². La perdon
de ĉio ĉi - kiom facile oni povas ĝin transvivi.
Facile kiom la vorton transvivi³.
Tempe de l'faŝismo
mi ne sciis, ke mi
vivis tempe de l'faŝismo.
Svarmis piano-instruistoj.
Kio ili fariĝis?
Tri-pfenig-moneroj cirkulis
kaj malaperis. Embarase
sin kaŝis la vorto nostalgio
en la vortaro Mitervaldo ĝis Odeno⁴.
Estis parolate frakture⁵.
Servistoj malaperis
tra la servistaj pordoj.
Sennombraj ekzistis arjanoj,
kiuj aperis ĉe la stratangulo
kiel droŝoj. Ili eble pensis,
ke ili estas bezonataj.
Tute sen plastsaketoj
iom aĝaj uloj transiris
suferige malrapide la malsekajn
oscedajn Adolf-Hitler-Placojn.
Knabinoj venis ĉiupaŝe,
kun ĵarteloj,
ĵarteloj kaj korsaĵetoj.
Maldecaj vortoj estis.
Sonfilmoj sonis.
Ĉio ĉi fariĝis
ĉiam pli malgranda,
nesenteblo kiel la peco de kruda sapo,
aŭ sendolore kaj subite,
kiel laktodento malaperinta.

Ekzemple la Germana Regno.
La estinto, prema
kaj teda, estas neimageble
facile malhavebla. Eĉ hodiaŭ
mi ne scias precize,
kio estas tio: nostalgio.
Signo de maljuneco eble,
aŭ io kontamina.
Publaŭsoj, publikaŭsoj,
kio vi fariĝis?
Enpaku do la malnovajn fotojn.
Mi fidas prefere
la efemeron.
Ĝi ne estigas
emocion, estas persista
kaj haltas antaŭ nenio.



Notoj

- 1) *tiel estis nomata la malmultekosta radio dum la Hitlera tempo en Germanio*
- 2) *kiu servis por biciklo: per ĝi oni mallarĝigis la malsupran parton de pantalone, por protekti ĝin kontraŭ tuŝo al la malpura bicikla ĉeno.*
- 3) *germ. verschmerzen, elteni la perdon.*
- 4) *germ.: "Mitterwurzer bis Ohmgeld", do en germana vortaro tiu volumo, kiu entenas la kapvortojn alfabeto inter tiuj du vortoj.*
- 5) *Germanaj tekstoj skribatis, ĝis la unua mondmilito kaj ree dum la faŝismaj tempoj (1933-1945), en frakturaj literoj. Paroli senorname oni nomis paroli frakture (kun iu).*

Aŭtomato

Li tiras cigaredojn
por kelke da markoj cigaredojn.

Li tiras la kanceron
li tiras la apartismon
li tiras kelke da malproksimaj masakroj

Li tiras kaj tiras
sed tirante
ĉio malaperas kion li tiras

Ankaŭ la cigaredoj malaperas
Li rigardas la aŭtomaton
Li rigardas sin mem

Por momento
li aspektas kiel homo

Poste li remalaperas
Kun klako
falas la cigaredoj

Li malaperis
Estis nur momento
Estis speco de feliĉo

Li malaperis
Sub kion li estis tirinta
li kuŝas sepultita

Konciza biografio

Poste mi eksciis, ke estis iu vendredo,
kiam mi eliĝis, kriante,
el mia ĉerko, el mia patrino.

Inter mia perfida naskiĝo,
sigelita de oleo kaj akvo kaj salo,
kaj mia ennaska morto,

en tiu longa daŭro inter vendredo
kaj malvendredo estis mi vakcinita,
konfirmita, milittaŭgigita. Kiel feliĉo

estis rigardata la lakita vizaĝo de la perforto.
Unufoje jare ŝanĝiĝis la neĝo.
Mian mortĉemizon mi ŝanĝis ĉiutage.

Mi estas rimarkinta la kvar ĉielajn regionojn.
Miajn vortojn la vento forrabis.
Nenia gloro, nenia fajro min konsumis.

Vespere mia hepato pezas kiel kampoŝtono,
kaj kiam vendrediĝas, mi aŭdas kriadon,
kvazaŭ mi krius en mia blanka ĉemizo,

kiel antaŭ delonge, hore de mia naskiĝo.
Tiam mi ekdormas malserene kaj pensante:
Tio min ne koncernas. Estos alia

milito, alia morta hundo, ne mi,
estos pafata al luno, enfosaĉata
en senspirita, krianta spaco.

Middle Class Blues

Ni ne rajtas plendi.
Ni plene okupiĝas.
Ni satas.
Ni manĝas.

La herbo kreskas,
la nacia produkto,
la ungo,
la pasinteco.

La stratoj malplenas.
La bilancoj ¹ perfektas.
La sirenoj mutas.
Tio pasas.

La mortintoj estas farintaj sian testamenton.
La pluvo postlasis akvon ².
La milito ankoraŭ ne estas deklarita.
Tio ne urĝas.

Ni manĝas la herbon.
Ni manĝas la nacian produkton.
Ni manĝas la ungojn.
Ni manĝas la pasintecon.

Ni havas nenion por kaŝi.
Ni havas nenion por preterlasi.
Ni havas nenion por diri.
Ni havas.

La horloĝo estas streĉita.
La kondiĉoj estas ordigitaj.
La teleroj estas lavitaj.
La lasta aŭtobuso preterveturas.

Ĝi estas malplena.
Ni ne rajtas plendi.
Kion ni ankoraŭ atendas?

Notoj

1) *germane: Abschlusse, estas aŭ bilancoj aŭ interkonsentoj*

2) *germana vortludo: ,nachgelassen', signifas ,malfortiĝis' (pri pluvo) kaj ,postlasis' (pri heredaĵo)*

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/Encensbergo.html>

* *La germana verkisto, ĵurnalisto, tradukisto kaj eldonisto Hans Magnus ENZENSBERGER - en Esperantujo konata kiel Hans Magno Encensbergo - naskiĝis je la 11-a de novembro 1929 en Kaufbeuren, Bavario. Li studis literatursciencon, lingvojn kaj filozofion en la universitatoj de Freiburg, Hamburgo, Erlangen kaj Parizo, doktoriĝis en 1955 pri la poetiko de Clemens Brentano. Ekde 1957 Enzensberger laboras kiel verkisto. Li gajnis plurajn literaturajn premiojn, inter alie la Georg-Büchner-Preis (1963), la*

"Heinrich-Böll-Preis der Stadt Köln" (1985) kaj la "Heinrich-Heine-Preis der Stadt Düsseldorf" (1998). La esperantisto Richard Ledermann estis la patro de lia patrino.



Fettes alvenas nur unu semajnon antaŭ la lunda komitata kunsido en la Universala Kongreso kie ĝi devos esti pritraktita.

Komitatano Renato Corsetti aktive kontribuis al la konkludoj de la raporto kadre de komitata laborgrupo kiun li iniciatis. Li konstatas ke la raporto principe devis esti dissendita pli frue, sed ke la malfrua sendo havas ankaŭ siajn avantaĝojn:

– Fakte, laŭ mi ĝi devis esti sendita iom antaŭe, sed ankoraŭ nun ĝi estas bona bazo por la komitataj diskutoj en la UK, kaj pro tempomanko la kutimaj trokontribuantoj al la listo UEA-membroj ne havos la okazon utiligi ĝin.

La raporto proponas tre drastajn paŝojn, ĉu vi trovas ilin pravigitaj?

– Jes, la paŝoj estas drastaj sed la vera demando estas: ĉu la priskribita situacio estas ĝusta? Se ĝi estas ĝusta la drastaj paŝoj estas pravigitaj. Kaj eĉ se ĝi estus iom troigite malbona, tamen oni devos draste interveni por eviti bankroton post kelkaj jaroj. Cetere la paŝoj estas drastaj sed lasas la realig-tempojn en la manoj de la nova estraro, kio povus signifi prudentan laŭŝtupan realigon.

Unu el la plej drastaj paŝoj estas la propono fordonaci grandan trezoron: bibliotekon Hodler, kiu estas unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj en la mondo. Corsetti ne trovas ĝin konservinda sub UEA:

– Ĝi havis 4 vizitantojn ĉiujare, el kiuj unu mortis antaŭ du-tri jaroj. Ĉu vi mem, se vi estus la posedanto de ĝi, pretus pagi ĝiajn kostojn? Ĉu liberiĝi de la libroservo? La merkato diras tion. Cetere librovendejoj fermiĝas ĉie tra la mondo. Unu afero, laŭ mi, estis iom tro milde prezentita en la dokumento de Mark: kiam la sidejo en Roterdamo estos malplena, oni ludonu ĝin kaj per la lupago financu la agadon kompanse al la bankaj rentoj, kiuj ne plu ekzistas.

Ĉu vi ne timas, ke plia malbonigo de la servoj proponataj de la asocio akcelos la membrofalon?

– Jes kaj ne. La membrofalo komenciĝis antaŭ longa tempo. Oni daŭre parolis pri ĝi kaj laŭ la

momento trovis oportunajn klarigojn. Al kio ĝi ŝuldiĝas? Verŝajne al la ŝanĝiĝo de la mondo, al kiu UEA ne adaptiĝis, al la malriĉiĝo de la mezaj klasoj en Eŭropo dum la lasta jardeko kaj eble al multaj kaŭzoj ankoraŭ, sed, se oni rigardas la bildon pri la divido laŭ aĝoj de la membroj de UEA, oni komprenas multon. Ĉiuokaze, por reveni al la servoj, la sola servo, kiun esperantistoj "aĉetas" estas la Universala Kongreso, kaj tiu ne estas tuŝata de la "ŝparoj".

– Eble UEA, laŭ mi, devus okupiĝi iom pli pri Esperanto kaj lasi la prizorgon de la komunumo al la Civito aŭ similaj organizaĵoj, kiuj celas fari ion pli facilan, dum UEA devas celi la malfacilan laboron informi la mondon pri Esperanto kaj la valoroj de paco kaj interkompreniĝo kaj justeco ligitaj al ĝi. Kaj temas pri mondo, kiu ne plu atentigas pri tiuj valoroj. Ĉu tiel oni trovos alian specon de membroj?

Laŭ Renato Corsetti ne indas serĉi kulpulojn de la nuna situacio, sed ĉiuj kunlaboru por savi la movadon:

– Mi tute ne estas feliĉa kiel oficanto de la entombigo de la Roterdama UEA, ĉar tiu entombigo estas la sigelo de la malsukceso de mia generacio de aktivuloj. Ni tremprenis de Lapenna asocion kreskantan kaj amatan de la esperantistoj kaj de triumfo al triumfo ni sukceis detruigi ĝin. Nun, tamen, ne gravas personoj kaj personaj sentoj. Ni ĉiuj devas kunlabori por savi la Esperanto-movadon. Ne serĉu kulpulojn.

En la reta diskutejo de la komitato de UEA unu tagon post la dissendo de la buĉopropono aperis nenia komento aŭ reago pri ĝi. Ja aperis mesaĝoj pri kompensa arboplantado kaj pri Unesko-Kuriero.

La plena raporto de Mark Fettes: Evoluvojoj por UEA surbaze de financaj faktoj kaj analizoj: <https://www.liberafolio.org/wp-content/uploads/2019/07/Evoluvojoj-por-UEA-2019.pdf>

Fonto: <https://www.liberafolio.org/2019/07/16/fettes-proponas-buci-la-centran-oficejon/>

Ŝercoj



Unu blondulino veturas per dupersona aviadilo, kie koratako trafis la piloton kaj li tuj mortis. La blondulino krias

en la mikrofono:

- Turo, helpu min, mi estas en ekstrema bezono. Mortis la piloto!
- Sinjorino, trankviliĝu! – respondis la turo. Unue donu al mi vian alton kaj pozicion!
- Mi estas 163 centimetrojn alta kaj mi sidas en la pilotejo...

En bazaro.

Aĉetanto:

- La fiŝo ne plaĉas al mi. Ĝi ne ŝajnas

bela, ĝi estas iom pala.

Vendanto:

- Kion vi volas? Ĝi vekigis frumatene, kaj ne havis sufiĉan tempon por meti ŝminkon.


- Mia kara, diru al mi, kial vi ekседziĝis jam la trian fojon? Ĉu vi estas tiom postulema?

- Ha, mia amiko, ne mi sed mia patrino...

Du amikoj parolas.


- Diru al mi, ĉu la nigra periodo de mia vivo iam finiĝos?

- Certe, vi ja ne vivos por ĉiam!



Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj



HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Ili baldaŭ estos geedzoj.
8. Apartenanta al oni.
9. Eŭropa Ekonomia Komunumo.
10. Uzi muzikilon (radiko).
11. Komenco de movado.
13. Esprimanta seksan volupton.
17. Redaktoro de Esperanto de 1974 ĝis 1984 (familia nomo).
19. Karesa parolmaniero (du vortoj).
20. Manĝaĵo el herboj aŭ legomoj kutime spicita per salo kaj saŭco (radiko).
22. Maltrista.
25. Mi naskiĝis kelkajn jarojn antaŭ vi, mi estas pli ... ol vi.
26. Rilata al la plej multe loĝata ŝtato en la mondo.
27. Ĉefurbo de Samoo (radiko).
28. Parto de la vira korpo inter la anuso kaj la skroto.
30. Ankoraŭ ne estiĝinta.
32. Aviso sen vokaloj.
33. Cilindra metala peco kiun

oni plilarĝigas per frapoj por firme kunfiksi du lamenojn (radiko). 34. La principo karakterizata de la alterno de jino kaj jango. 35. Apartenanta al li.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Rilata al artefarita homo kiun, laŭ juda legendo, rabeno kreis en la 16a jarcento.
2. Malplezuri pro senintereso aŭ neokupiteco (radiko).
3. Ne trompanta la konfidon.
4. Nedifina adjektiva tabelvorto.
5. Konservanta larvajjn aŭ junecajn karakterojn, kvankam kapabla sin reprodukti.
6. Prepozicio esprimanta la ĝeneralan ideon de senpera tuŝeco.
7. Kvar kvinonoj de dek.
11. Modernjunstila, junule bonega.
12. Dispremita en la buŝo per la dentoj.
14. Taĉmento el soldatoj (radiko).
15. La redaktoro de Esperanto en perspektivo (antaŭnomo kaj nomo).
16. Komenco de kiso.
18. Kapabla krei, elpensi, fantazii.
21. Spekuli pri la prezoŝanĝo de la borsaj valoraĵoj aŭ de varoj.
23. Enpreno de fremda teritorio en sia regno.
24. Rilata al tempomezurunuo egala al la daŭro de unu kompleta rondiro de Tero ĉirkaŭ Suno.
27. Membro de grupo.
29. Titolo de la poemaro de Kalocsay aperinta la jaron post lia morto (radiko).
31. Finaĵo kies uzado en komparo kun ita vekis longan disputon inter esperantistoj.

Fonto: Semajno de Enigmoj #3

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

En arbustaro densa, dum vespero,
 Embuskis kun minac' Rabist',
 Kaj kiel urso en severo
 Atendis li viktimon kun persist'.
 Kampulo venis jam kun sia granda ĉaro.
 "Jen estas por foir", verŝajne, varo, —
 La ŝtofo luksa, drapo por admir'.
 Atakos mi, — kaj fruktos bon-akir'.
 Ne vane mi atendis en arbaro."
 Rabisto en subit' ekkriis laŭte: „Halt'!”
 Kaj al Kampul' sin ĵetis kun bastono;
 Sed ne sukcesis li en sia salt'.
 Responde la Kampul' rebatis al fripono;
 Ĝi estis por Rabist' tre forta leciono;
 Kampulo kun ekzalt'
 Batalo sin defendis.
 Reziston de Kampul' Rabisto ne atendis.
 Okazis interbat' kruela kun dolor'.
 Dek dentojn la Rabist' suferis en batalo,
 Rompita tute brak'; okulo estis for.
 Sed venkis la krimul' en la atak' fatala,

Mortigis li Kampulon sen kompat'.
 Sed kion gajnis li en tiu interbat'?
 Vezikojn en abund', - jen estis rezultat'.
 Tre oftas en la viv' — pro simpla bagatelo
 Okazas krimoj nur, — sovaĝaj kaj sen celo.


verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
 tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
 Ukrainio



Blogo de instruisto de Esperanto

-- el la blaga blogo

Substreku de aŭ da:



(Ĉe vendotablo de malnova vinvendejo)

VENDISTO 1 - Bonan tagon!

KLIENTO - Bonan tagon!

V1 - Kion vi deziras?

K - Mi deziras iom de/da vino. Mi ŝatus aĉeti botelon de/da ruĝa vino.

V1 - Ĉu vi kunportis botelon de/da vino?

K - Mi ne komprenas. Mi volas aĉeti botelon de/da vino.

V1 - Jes. Sed mi demandas, ĉu vi havas botelon. Mi celas malplenan botelon de/da vino por ke mi plenigu ĝin per la plej bona ruĝa vino. Ni havas la vinon nur

en bareloj.

K - Ha, bone. Nun mi komprenas.

Ne. Mi havas nek botelon de/da vino, nek botelon de/da akvo. Nenian botelon mi havas.

V1 - Do, unue vi devas aĉeti botelon de/da vino ĉe la alia vendotablo kaj poste bonvolu reveni por aĉeti botelon de/da vino.

(Ĉe la alia vendotablo)

VENDISTO 2 – Bonan tagon!

K - Bonan tagon!

V2 - Kion vi deziras?

K - Mi volas aĉeti botelon de/da vino por poste aĉeti botelon de/da vino.

V2 - En ordo. Mi havas tiajn botelojn de/da ŝaŭmvino, kiuj estas malmultekostaj, kaj tiajn ĉi elegantajn botelojn de/da ruĝa vino, kiuj estas pli multekostaj.

Kian vinon vi volas aĉeti?

K - Hm! Nu, fakte mi aĉetos botelon de/da ŝaŭmvino (mallaŭte dirante nur por si mem) por poste aĉeti botelon de/da ruĝa vino.

(Ĉe la unua vendotablo)

V1 - Saluton denove!

K - Resaluton!

V1 - Ho, mi pensis, ke vi volas aĉeti botelon de/da ruĝa vino, sed vi havas botelon de/da ŝaŭmvino...



K - Jes. Se tio ne estas kontraŭleĝa, bonvolu plenigi mian botelon de/da ŝaŭmvino per la plej bona ruĝa vino el viaj bareloj.

V1 - En ordo. La kliento ĉiam pravas. Ĉu vi deziras ion alian?

K - Jes, ĉu vi havas glasojn?

V1 - Kompreneble. Ĉu vi celas glasojn de/da vino aŭ glasojn de/da vino?

K - Veeee!!! Mi ekkabeos kaj lernos ldon!

Solvo: da, da, de, da, de, de, de, de, da / de, da, de, de, de, da / da, de, de, da, de

verkis **Viktoro SOLÉ**, Katalunio

Fonto: "La blaga blogo", **revuo Kontakto**, #279, 2017:3, p.17

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (35)

DUA PARTO - LA VIVO

60



**Landon oni devas gvidi tiel,
kiel oni rostas fiŝetojn.**

**Se oni administras la mondon laŭ la TAŬO
jen la mortintoj ne rondiras kiel fantomoj.**

**Ne estas tiel, ke la mortintoj ne estas
fantomoj,**

sed iliaj spiritoj ne damaĝas la homojn.

**Ne nur la fantomoj ne damaĝas la homojn,
ankaŭ la saĝulo ne damaĝas ilin.**

**Se do ambaŭ tiuj fortoj reciproke ne damaĝas
sin,**

**tiukaze ili unuigas siajn vivfortojn en ilia
efiko.**

Rimarkoj de Anniespera:

Vilhelmo:

"jen la mortintoj ne rondiras kiel fantomoj.

Ne estas tiel, ke la mortintoj ne estas fantomoj,
sed iliaj spiritoj ne damaĝas la homojn.

Ne nur la fantomoj ne damaĝas la homojn,"

Ĉi supraj tradukfrazoj, laŭ mi, estas malpli fidela al la originalo ol la traduko de Wang Chongfang:

"La fantomoj ne povas fari malutilon.

Tio estas ne tial, ke ili ne povas hanti,

Sed tial, ke ilia hantado ne povas esti malutila al la homoj;

Tio estas ne tial, ke ilia hantado ne povas esti malutila al la homoj."

Komento de Wang Chongfang

"La regado de granda regno estas kiel fritado de fiŝeto" estas unu el la famaj diroj de Laŭzi, kiuj vaste cirkulas. Ĝi figure montras, ke la regado de regno devas esti farata laŭ la principo de „senagado“, t.e. konforme al la Taŭo. Kiel oni ne devas ofte turnadi la tro delikatan fiŝeton dum fritado, tiel la regantoj ne devas ĝenadi la popolon per tro da trudaj ordonoj kaj severaj leĝoj. Se la regno estos regata laŭ la principo de „senagado“, tiam la popolo ĝuos trankvilecon kaj vivos pacan, feliĉan vivon, suferante nenian ĝenadon de la regantoj, nek de la fantomoj, ĉar tiam ili, la regantoj kaj la fantomoj, ĉiuj submetiĝos al la Taŭo.“

(daŭrigota)

Legi estas bone

verkis Apáti Kovács Béla el Hungario

Kial legi, se oni povas spekti televidoprogramojn, filmojn kaj informiĝi helpe de interreto?

Bedaŭrinde la nuna homo jam ne ŝatas legi. Oni diras: „Mi ne havas tempon.“

Ĉefe la gejunulojn ne interesas la legado. Ili prefere fingrumas sian komputilon.

Veturante per vagonaro mi jam apenaŭ vidas legantajn homojn. Eĉ ankaŭ maljunuloj rigardaĉas la ekranon de la tabulokomputilo aŭ ludas per komputilo.

Ankoraŭ antaŭ kelkaj jardekoj la libro estis bona kunulo de la vojaĝanto.

Kiam mi veturas per vagonaro aŭ aŭtobuso mi ĉiam kunportas libron. legi estas tre bone. La legado vigligas la cerbon, kreskiĝas la fantazon.



Se mi havas bonegan romanon, antaŭ mi ekaperas rakonto. Mi vidas ĉion, tiel kvazaŭ mi estus sidanta en kinejo. Ĉirkaŭ mi ĉesas la mondo. Mi transiras alian dimension kaj pli rapide pasas la tempo. Tiel la vojaĝo estas pli agrabla.

Do, legu ĉiutage, ĉar legi estas bone!

verkis **Apáti Kovács Béla** el Hungario

En la Tombo


Kiam mi maldormiĝis kaj malfermis la okulojn, ĉirkaŭ mi estis absoluta mallumo. Mi kelkajn sekundojn kuŝis senmove, penante klarigi al mi, kie mi estas. Ĉirkaŭe estis profunda silento. Mi miris, ke mi ne aŭdas la iradon de mia poŝa horloĝo, kiun mi ĉiam metas apud mia lito sur la noktan tableton, kaj mi eltiris mian manon por preni alumetojn, sed mia mano tuj frapiĝis je la mureto.

Tio ĉi forte min mirigis. Mi restis ankoraŭ kelkajn minutojn sen movo, penante doni al mi kalkulon pri tio, kie mi min trovas. Mi metis atenton sur tion, ke mi kuŝas sur io malmola kaj malglata: tio ĉi ne povis esti mia lito. Per la maldekstra ŝultro mi ankaŭ sentis ion malmolan. Nenion komprenante, mi volis min levi kaj mi frapiĝis per la kapo je la baro.

Terura penso, elvokita kredeble per neklara ekmemoro, aperis kiel fulmo en mia kapo. Tiu ĉi penso estis tiel terura, ke mi ne kuraĝis eĉ formuli ĝin. Mi eĉ timis min moveti, por ne trovi jesigon de ĝi, kaj, ferminte la okulojn, mi komencis rememoradi, kio estis kun mi antaŭ mia lasta dormo. Sed mi absolute nenion povis rememori. Mi aŭskultadis – morta silento. Mi denove malfermis la okulojn kaj denove vidis nepenetreblan mallumon. Teruro komencis min kaptadi, teruro elvokita per penso pri io, kio prezentiĝis al mi tute komprenebla kaj kion tamen mi ne kuraĝis eĉ nomi al mi.

Fine mi decidis levi la manojn kaj palpi tion, je kio mi frapiĝis per la kapo. Per palpo mi eksentis supre lignan tabulon kaj tiajn samajn tabulojn ĉe la flankoj kaj sub mi. Estis tre klare, ke mi kuŝas en alnajlita kesto. Kaj kvankam la penso pri tio ĉi ĵus senvole aperis al mi, sed la ĝusteco de tiu ĉi supozo estis tiel neatendita kaj premanta, ke mi en la unua minuto perdis ĉian kapablon konsideradi. Mi palpatis per la manoj la muretojn de la ĉerko kaj ripetadis al mi: mi estas enterigita vive.

Kiam pasis la unua rigidiĝo, ĉe kies sola rememoro ankoraŭ nun atakas min frostoj, mia unua penso estis, ke mi eble ne estas ankoraŭ enfosita, ke, se mi donos signon de vivo, oni eble aŭdos min, oni eble helpos al mi. Mi komencis frapadi en la kovrilon de la ĉerko kaj ekkriis per mia tuta forto, sed mia voĉo sonis tiel surde kaj sovaĝe, ke mi mem ekremis de ĝia sono. Kun streĉa haltigo de la spirado mi komencis aŭskultadi, penante kapti eĉ ian sonon el ekstere, sed mi aŭdis nur, kiel la sango kvazaŭ per marteloj batadis al mi en la tempioj. Mi ripetis kelkajn fojojn tion ĉi saman, kaj ĉiun fojon mi aŭdis nur teruran silenton. Tio ĉi estis efektive morta silento, silento de tombo, de tiu terura loko, kie la vivo ne ekzistas, kie absolute reĝas la



morto. Tiu ĉi silento estis mia aljuĝo al morto, aljuĝo pli minaca, ol se ĝi estus subite elparolita per tondra voĉo, sed nur voĉo de viva ekzistaĵo. Ne povis esti ia dubo, ke mi estas enfosita en tombon, ke mi venis tien, kien venas nur mortintoj kaj de kie ne ekzistas reveno. Mi malvarmiĝis de teruro.

Estas io majesta, eĉ vigliga, en la trankvila konscio de neevitebleco de la morto. Tiel en la tempo de la franca revolucio centoj da homoj kun profunda trankvileco iradis sur la ekzekutejon kaj mortadis kiel herooj. Sed morti preskaŭ momente, iri al la morto, vidante super si la bluan ĉielon, enspirante la lastan fojon per plena brusto la vivigan aeron – kaj morti en malvasta kesto, enfosite en la teron, kaj esti atestanto de sia propra agonio – estas grandega diferenco. En la tombo ne ekzistas tiu vigla sento de vivo, kiu kuraĝe renkontas eĉ la ĝin neniigantan morton. La turmentoj de vive enterigita sekvas jam post la ekzekuto, kaj de ili estas liberigita ĉiu alia ekzekutita. Tiu ĉi iras en la tombon kun jam estingita konscio, en la tombon oni metas malvivulon, sed ne vivan homon. Kaj mi estis metita en ĝin viva, mi vekiĝis en ĝi kun pasia amo de l' vivo kaj kun la terura konscio, ke mi estas elstrekita el la nombro de la vivuloj. Inter mi kaj la vivo estis tavolo da tero, nur unu tavolo da tero, kaj nur pro tio, ke mi ne povis ĝin levi, mi devis morti. Oni devas mem travivi tiun ĉi aŭ similan staton, por kompreni, kion mi devis elsuferi ĉe tiu ĉi penso. Denove min atakis rigidiĝo, rigidiĝo de malespero. Mi kuŝis tute trankvile, kaj komencis kun malvarma sango pripensadi mian situacion. Mi enfalis en letargion, al kiu mi ĉiam havis la emon, kaj oni prenis min por mortinta. Mi kondukadis izolitan vivon kaj neniam diris al iu, pri mia emo al tiu ĉi malsano. Estas vero, ke mia frato sciis pri tio ĉi, sed li loĝas en malproksimo de centoj da kilometroj kaj ne povis scii, kio fariĝis kun mi. Se li estus apud mi, li ne permesus min enterigi. Sed li ne estis, kaj oni min fermis en tiun ĉi keston kaj enfosis en profundo de du-tri metroj. Nenia sono de la supraĵo

de la tero atingis al mi; sekve nenia mia krio povas atingi eksteren. Ekster tio, la mortintejo sin trovas ekster la urbo kaj prezentas tre izolitan lokon. Al neniuj povis veni en la kapon la penso, ke mi estas enterigita vive. Mi estas aljuĝita al morto – tio ĉi estas klara. Mi eĉ elkalkulis kun malvarma sango, kiun mi nun mem ne komprenas, kia maso da tero kuŝas super mi: kalkulante la longecon de la tombo du metrojn, la larĝecon unu, la profundecon du metrojn, kaj supozante, ke sur la ĉerkon falas nur duono de la tuta pezo, mi divenis, ke – se tio ĉi havus sencon – mi devus levi pezon de pli ol 2000 kilogramoj: por tio ĉi ne estus sufiĉa eĉ la forto de Samsono. Sed kion povis al mi doni eĉ la forto de dek Samsonoj, kiam mi ne havis la liberecon de movado. Mi subite eksentis, ke estas al mi terure malvaste, kaj la konscio de tiu ĉi malvasteco komencis elvokadi en mi rekte fizikajn suferojn. La penso, ke super mi kuŝas dumetra tavolo da tero, faris sur min tiel premantan impreson, kvazaŭ tiu ĉi maso premus ne sur la kovrilon de la ĉerko, sed rekte sur mian bruston. Mi komencis sufokiĝi. En teruro mi turnadis min de unu flanko sur alian, premadis per la manoj kaj genuoj la kovrilon de la malbenita ĉerko, kun kolerego penadis deŝiri ĝin, kaj fine, perdinte la fortojn, mi eletendis min sur la fundo de mia malliberejo. Larmoj de furiozeco atakis min, kaj mi ilin ne retenis.

Mallumegaj, koleraj pensoj komencis min atakadi. Por kio mi devas elportadi turmentojn, kiuj superas ĉiujn elpensojn de la inkvizicio? Kial el centoj kaj centoj da miloj mi sola, ĝuste mi, ricevis ilin, mi, plena de fortoj, esperoj, atendoj? Mi kuŝas sub la tero kaj devas kalkuli la minutojn, kiuj apartigas min de La morto, vidi kiel ĝi pli kaj pli proksimiĝas al mi, dum dekoj da miaj konatoj senzorge babilas, gajas kaj tiel same malmulte pensas pri la morto, kiel malmulte ankaŭ mi pensis kiam mi estis inter ili. Ili vivas, kaj mi ne sole estas fordonita al la morto, sed estas ankoraŭ elmetita al la plej rafinitaj suferoj, kiujn nur povas havi homo. Kie estas la Justeco, mi demandadis min, kaj mi ne povis ne vidi, ke ne ekzistas situacio, en kiu la senceco de simila demando estus pli klara ol en la mia. Pri kia justeco povas esti parolo tie, kie la aferon decidis okazo? Ĉu ne per la fatala malkompreniĝo mi troviĝis tie, kie pli ĝuste devus sin trovi multaj el la restintaj sur la tero? Okazo, blinda okazo ludas kun ni, kaj ĉiuj ni estas tiom miopaj aŭ malkuraĝaj, ke ni ne vidas tion, kio frapas al ĉiu en la okulojn. Sur ĉiu paŝo ni mensogas al ni, trompas nin mem, kaj ĉio tio ĉi nur por fine diri al ni mem, ke ni estis memvolaj blinduloj. Por kio? En tiu ĉi minuto mi malamamis tiun saman vivon, al kiu mi ĵus tiel pasie min ŝiris. Se mi ne estus naskita, mi diris al mi, mi nenion perdis kaj senfine

multe gajnus jam per tio sola, ke mi ne suferus tion, kion mi devis suferi nun. Kaj tion ĉi, kion mi nun elportas, mi dankas al tiu krima malŝato, kun kiu la homoj sin tenas rilate la morton de alia, al tiu malnobla rapideco, kun kiu ili penas liberiĝi de siaj mortintoj. Senpotenca kolero min sufokadis, kolero kontraŭ la societo, en kiu estas eblaj tiaj okazoj, kontraŭ ĝiaj moroj, kontraŭ ĉiuj vivantaj, kontraŭ la tuta mondo.

Ĉio estis finita kun la vivo: mi pli ne apartenis al ĝi. Tie, supre, ĝi bolas, kiel ĝi bolis milojn da jaroj antaŭ mi, kaj kiel ĝi daŭrigos boladi post mi. Kio ĝin interesas, ke unu el ĝiaj portantoj estas ĵetita inter malvivulojn kaj post kelkaj horoj mem fariĝos malviva? Kion signifas por ĝi aparta persono? Milionoj da homoj mortadis antaŭ mi kaj milionoj deirados en la profundaĵon de la mortintejo post mi, kaj novaj milionoj, plenaj de pasio de vivo, okupados ilian lokon, kiel unu vico da ondoj anstataŭas la alian sur la supraĵo de la akvo. Mi ekmemoris la vortojn de Schopenhauer: la naturo zorgas nur pri la gento; la individuo estas por ĝi nulo. Kaj nur tie ĉi, en la mallumo de la tombo, forgesita de la vivo, kiu tute ne interesis sin je mi, mi komprenis la tutan maldolĉan ĝustecon de tiuj ĉi teruraj vortoj. Mi estas nulo por la naturo, kaj al ĝi estas tute egale, ĉu mi volas aŭ ne volas morti: laŭ ĝiaj leĝoj mi devas morti, sufokiĝinte de manko de aero. Por kio do estis tiuj jaroj de ekzistado tie, sur la supraĵo de la tero, jaroj plenaj de neefektiviĝintaj revoj, suferado, obstina batalado por la rajto vivi kaj maloftaj, maloftaj lumaj minutoj? Kian celon, kian sencon havis tiu komedio, kiu finiĝis per tia monstra fino? Tiu ĉi demando, kiu maltrankviligas ne multajn kaj eĉ de tiuj estas forĵetata kiel sencela, por mi, viva malvivulo, montriĝis sole ne senenhava demando. La tuta estintaĵo subite kun frapanta klareco leviĝis antaŭ mi; pentraĵoj el la estintaĵo pasis unu post la alia, kaj eĉ la plej palaj el ili elnaĝadis el la profundo de la senkonscia memoro kun tia klareco, kia ordinare estas ebla nur por impresoj de hieraŭ. Mi kuŝis, ferminte la okulojn kaj simple vidis, kiel scenoj el mia vivo kun magia rapideco sekvadis unu post la alia. Kaj subite mi ekvidis unu el tiuj scenoj, kies memoron oni ordinare pelas de si kaj kies rememoron oni ĉiam penas silentigi en si kaj kiuj en tiaj minutoj, kiajn mi nun travivadis, kun aparta forto eliras eksteren. Prezentiĝis al mi malbela sceno el la tagoj de mia juneco: mi, kolerigita per io tute flanka, senkompatate batis mian hundon. Tiu ĉi hundo distingadis sin per granda kvieteco kaj sincere min amadis. Kaj mi ekvidis ĝian kvietan vizaĝon kun esprimo de sufero en la okuloj, kaj tiuj ĉi malgajaj okuloj bruligis min per silenta riproĉo, kaj mi sentis per la brulado de la vizaĝo, kiel koloro de honto denove ĝin kovris. Se krimo estas

elaĉetata per turmento de la konscienco, mi fine elaĉetis tiun ĉi abomenan agon per tiaj minutoj da maldolĉa honto kaj brula sufero, kiajn mi neniam volus travivi denove. Per nekredibla streĉo de la volo mi forpelis de mi tiun ĉi teruran vidaĵon kaj koncentris mian atenton sur novaj figuroj kaj pentraĵoj. Mi vidis min jen kiel infanon, ludantan sur la korto de nia malnova domo, jen kiel knabon sur la benko de lernejo, jen kiel jam grandan homon – en la vojo, sur la ĉaso, en mia oportuna kabineto, el kie mi estis elportita kiel mortinto per la manoj de vivantaj. Kun aparta heleco prezentiĝis al mi du pentraĵoj: unu el la nemalproksima estintaĵo, la alia el mia infaneco. Mi vidis la arbaron, en kiu mi ofte ĉasadis antaŭ du jaroj, kaj subite blovis sur min malseka malvarmeto de ĝia densa internaĵo kaj ĝia potenca saniga aromato, kiun mi kun tia amo tiel avide enspiradis, kiam mi tutajn horojn vagadis en ĝi. Mi vidis ĝin en varmega tagmezo kaj en vespero, kiam la lastaj radioj lumis sur ĝia supro, kaj tiu ĉi detalo de sia flanko elvokis unu el la plej fortaj impresoj de mia infaneco. Mi ne scias kial, sed en mia infaneco la subiro de la suno ĉiam metadis min en silentan malgajon. Mi rampadis sur la tegmenton de la kelo kaj observadis de tie, kiel la estingiĝanta suno malrapide kaŝadis sin post la najbaraj konstruoj, kaj la stranga maltrankvileco min atakadis. Mia imago pentris tiun ĉi scenon kun tia forto, kvazaŭ mi alestus ĉe efektiva subiro de la suno. Kaj subite la antaŭa sopirado denove venis al mi kaj mi denove eksentis la tutan teruron de mia situacio. Mi denove eksentis, ke estas al mi malvaste, ke mankas al mi lumo kaj aero, kaj mi denove komencis sufokiĝadi.

Mi kuŝiĝis sur flankon kaj komencis aŭskultadi. Por kio? mi demandis min mem: tute egale, mi nenion povis aŭdi. Ĉu estas tago aŭ nokto, tie, supre? Mi ne sciis tion ĉi kaj ne povis sciiĝi. Surda, premanta silento kaj absoluta mallumo ĉirkaŭis min. Sur la tero eble eĉ estis tago, sed ĉe mi estis netrapenetrebla nokto. Sed se supre estas tago, iu povus viziti la mortintejon, eble povus aŭdi bruon el mia tombo kaj en tia aŭ alia maniero doni al mi helpon. Mi tre bone konsciis, ke tio ĉi estas simple infana penso, ke neniu povis min aŭdi, kaj tamen mi pasie min alkroĉis al tiu ĉi mizera lumeto de espero. Mi denove komencis batadi per la manoj kaj piedoj en la kovrilon de la ĉerko, akompanante mian frapadon per tia ĝemado, kiu kredeble tre malofte eliras el homa brusto, – kaj denove mi havis kiel respondon mortan silenton. Tio ĉi daŭris tiel longe, ĝis mi absolute perdis la fortojn. Atakis min sento, al kiu mi eĉ ne povas trovi nomon. Tiu ĉi miksitaj sento de sopiro, teruro, senhelpeco kaj malespero estis en tia grado monstra, ke mi ekploregis, kiel infano.

La morto, malbela morto, per grandaj paŝoj proksimiĝadis al mi, kaj mi per nenio povis haltigi ĝian proksimiĝadon. Oni ne devas pensi pri ĝi, mi diris al mi; oni devas pensi pri la alia. Sed pri kio mi povis pensi? Pri rimedoj de eliro el tiu ĉi fosoj? Eliro estis neebla. Laca de sopira malespero kaj de sovaĝaj sintiroj al la vivo, mi devis morti, sufokiĝinte en mia tabula malliberejo. Mi ne povas diri, ke mi tremis antaŭ la morto, kiel antaŭ fakto de neniigo. Mi volis vivi, sed ĉe sia tuta forto tiu ĉi deziro ne povus tute mortigi en mi tiun fizikan kuraĝon, kun kiu homo povas pli aŭ malpli trankvile atendi neeviteblan morton. Mi estis trankvila ĉe la penso, ke post negranda spaco da tempo por mi venos la stato de neestado; sed tiu cirkonstanco, ke mi devis pereji ĝuste tiel kaj ne alie premis min. Terura estis por mi ne la morto mem, sed la maniero de morto. Sur la supraĵo de la tero mi povus renkonti ĝin kun deca firmeco: mi havas kaŭzon pensi tiel; tie ĉi sur la fundo de superŝutita fosoj, mi sentis min disbatita, dispremita, turnita en nenion. Mi eĉ mem volis ĵeti min en la brakojn de la morto, vidante en ĝi la solan eliron el miaj suferoj: aperis al mi penso de propravola ĉesigo de ili. Mi rememoris, kiel unu Roma hetero, en la reĝado de Nerono, kulpigita pro politika krimo, sufokis sin mem per nazotuko, kiam oni ŝin, lacan de turmentoj, portis sur seĝo por novaj turmentegoj. La penso pri tia rimedo de liberiĝo eĉ ekstremigis min de ĝojo, kiel ekstrema malliberulo ĉe la sciigo de liberiĝo. Mi devis havi sur mi zonan rimenon; mi povis fari el ĝi maŝon kaj sen la kuraĝeco sole sub la premo de malespero, sufoki min mem. Sed mia ekzekutado iradis kvazaŭ laŭ antaŭe pripensita plano: mi ne trovis sur mi la rimenon. Tio ĉi estis ankoraŭ bato, kiu ĝis fino min dispremis. Mi ekgrincis per la dentoj de furiozeco; mi ruladis min en mia malvasta kaĝo, batante mian kapon sur ĝiaj muretoj, ne sentante doloron, kiun mi ne sentis eĉ tiam, kiam mi en blinda kolerego komencis mordadi miajn manojn. Mi ĝemadis, kiel vundita besto, sed tiajn ĝemojn, miksitajn kun tiuj frenezaj malbenoj, kiuj flugadis de mia lango, ne facile povas elvoki el homa brusto fizika doloro.

Tia turmentego ne povis longe daŭri: per rapidaj movoj mi elvokis fortigitan enspiradon de aero, kaj baldaŭ laŭ la premanta pezo en la brusto mi eksentis mankon de ĝi. Tiun ĉi fojon ĝi jam ne estis frukto de la imago: mi efektive komencis sufokiĝadi. Terura sonorado estis en miaj oreloj; ĝi plenigis per si la tutan ĉerkon; ĝi sonoris kiel la bruo de centoj da sonoriloj. Fajraj rondoj sin montradis antaŭ miaj okuloj, fariĝante pli kaj pli grandaj, fornaĝante ien en malproksimon kaj turniĝante en gigantajn ringojn, kiuj brilis per minaca sanga lumo. Mi sentis, ke mia saĝo komencis

malklariĝadi. La pensoj, kiel rapidega vento, flugadis tra mia kapo. Rememoriĝis al mi ial diversaj instruoj pri la ĉiopova potenco de la volo, kaj ŝajnis al mi, ke, se mi pasie ekdeziros eliri en la aeron kaj liberecon, mi en ia maniero povas liberiĝi. Kaj, kunpreminte la dentojn, mi penis koncentri mian tutan volon sur tiu ĉi punkto. Poste al mi, la nekredanta, aperis la penso, ke oni devas preĝi kaj ke tio ĉi necese min savos. Mi komencis elparoladi preĝojn, sed baldaŭ mi rimarkis, ke tio, kion mi kun febra varmego paroladis, estis ne preĝo, sed senliga kolekto da fragmentaj frazoj el diversaj preĝoj. Kaj mi diris al mi, ke tiel oni ne povas preĝi, ke tia preĝado nur kolerigos Dion. Subite mi aŭdis la demandon, elparolitan per raŭka interrompita voĉo: "Por kio?" Tio ĉi iom revenigis min al la efektiveco. Mi faris penon rekonsciiĝi, kaj mi rimarkis, ke en mi turnas sin la penso: por kio Dio min tiom persekutas, kaj ke tiun "por kio" mi, aŭ pli ĝuste mia lango, ripetis kelkajn fojojn laŭte. Sed tio ĉi estis la lasta peno; mi komencis perdadi ĉian kontrolon super mi. Sovaĝaj pensoj komencis interŝanĝadi sin kun sovaĝaj pentraĵoj. Grandega turo staris super mi, kaj tiu ĉi turo kun bruego falis, kaj mi volis kuri de sub la grandegaĵo, kiu flugadis sur min, kaj tiu ĉi grandegaĵo min jam atingadis... Iaj monstroj peladis min, mi faladis kaj subiĝadis en senfundan profundaĵon... Grandega martelo komencis batadi sur mian bruston,

kaj mi sentis, kiel mia brusto enplatiĝadis, kaj la batoj de la martelo terure tondris en miaj oreloj. La batoj fariĝadis pli fortaj kaj pli fortaj, kaj nigra nubo ĉiam pli kaj pli min enkovradis... Mi perdis la konscion.

Malferminte la okulojn, mi ekvidis lumon kaj ies konatan vizaĝon klinitan super mi. Tio ĉi estis la vizaĝo de mia frato, al kiu mi dankas mian savon. Sciante mian emon al letargio, li tuj post la ricevo de telegramo pri mia supozita morto elveturis el sia urbo. Sed ĉar la telegramo, sendita de unu nia komuna konato, estis sendita nur la duan tagon post mia supozita morto, li malfruis kaj alveturis kelkajn horojn post mia enterigo. Mi restis sub la tero ĉirkaŭ ses horojn, sed mi ne povas diri, kiom da tempo pasis inter mia vekigo kaj sveniĝo: por mi ĝi estis kaj restos – al mi, tute egale, ili ŝajnas jaroj, kaj ĉe la sola rememoro pri ili mia sango glaciigis. Mi ne sole vidis la morton vizaĝo kontraŭ vizaĝo, mi estis en ĝiaj brakoj, kaj tiuj ĉi brakoj estis teruraj, monstraj. Mi estis enterigita juna kaj eliris el la tombo preskaŭ maljunulo.

rakonto de **Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko**


Aperis en **La Esperantisto** 1892, ankaŭ en **La maŝino kiu kriis, Pro Esperanto** 1988

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/noveloj/01.html>

La langoelŝovema fizikisto


-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Hispanio

Ne ĉiuj scias ke la fama langoelŝovema fizikisto Ejnŝtejno, kiam li estis en sia pensejo skribante siajn matematikajn formulojn surnigratabule, por trovi la inspiron kutime li amis sin ĉirkaŭi per dombestetoj, kiuj kuŝis sub la skribotablo aŭ sur lia brakseĝo.



Kiam li iris al bestovendejo por aĉeti etan bestan inspirantan muzon, li diris al la bestovendisto: "Bonvolu, mi volas la plej inteligentan beston kiun vi

havas. Kio pri tiu papago?". Tuj la vendisto respondis: "oh, tiu papago estas tre inteligenta. Ĝi parolas tri lingvojn: la anglan, la rusan kaj la hispanan".



"Uhm, bone, kaj kio- pri tiu hundeto?" la sciencisto diris montrante per sia mano belan luphundon. "oh, tiu hundo estas tre tre erudicia. Ĝi verkis gravan libron pri matematiko kaj lineara algebro".

"Bone, tre interesa, kaj kio pri tiu katido?" demandis nia blankhara genio rigardanta fieran etan katon kiu dormetis sur dekorita plumkuseno. "Kara amiko" deklamis la vendisto per respektema voĉo "mi nur diros al vi, ke ĉiuj bestoj ĉi tie alvokas ĝin Majstro!!!"

sendis **Maurizio Brucco** el Hispanio

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

(daŭrigata)

Sed Tatjana Ivanovna bone konis ŝin: ŝi skuis la kapon, senvorte kunpremante siajn maljunajn lipojn.

Georgo Andronikof ĝemis, peze returnis sin, kaj duonvekiĝis.

"Mi estas tute ebria!", li dolĉe diris.

Li stumble iris al la fotelo, enŝovis sian vizaĝon en la kusenojn kaj restis senmova.

"Li laboras nun la tutan tagon en garaĝo kaj malsategas. Se ne ekzistus vino... kaj la cetero, pro kio utilis vivi?"

"Vi ofendas Dion, Lulu!"

La junulino subite kaŝis sian vizaĝon en la manoj kaj senespere eksploreis.

"Njanjuška!... Mi dezirus esti hejme... Hejme! Hejme!..." ŝi rediris, tordante siajn fingrojn per stranga nervoza gesto, kiun la maljuna virino ne konis. "Kial do ni estas tiel punitaj? Ni faris nenion malbonan!..."

Tatjana Ivanovna dolĉe karesis ŝiajn malkombitajn harojn, kiuj tenace odoris je fumo kaj vino.

"Tio estas la sankta volo de Dio."

"Ha! Vi tedas min! ... Nur tion vi povas diri!..."

Ŝi viŝis siajn okulojn kaj kolere levis la ŝultrojn.

"Nu! Lasu min!... Foriru!... Mi estas ekscitata kaj laca. Diru nenion al la gepatroj!... Kial do? Vi senutile ĉagrenus ilin, kaj nenion vi malhelpus, kedu min!... Nenion. Vi estas tro maljuna, vi ne povas kompreni."

(Fino de la 5a Ĉapitro)


Sesa Ĉapitro

Iun tagon en aŭgusto, kiam Cirilo revenis, la Karinoj okazigis meson por la eterna ripozo de l' animo de Jurij.

Ili ĉiuj piediris kune ĝis la strato Daru* . La tago estis admirinde bela; la suno flagris en la blua ĉielo. Sur la avenuo de Ternes** estis foiro en la plena vento kun senbrida muziko kaj polvo...

La pasantoj scivole rigardis Tatjanan Ivanovnan, ŝian nigran ŝalon sur la haroj kaj ŝian longan jupon.

En la strato Daru, la meso estis celebrata en la kriptoj de la preĝejo; la kandeloj dolĉe kraketis kaj, inter la religiaj kantoj, aŭdiĝis frapetoj de gutoj de varmega vakso falantaj sur la kahelojn.



"Por la ripozo de l' animo de la servisto de Dio, Jurij..."

La pastro, maljuna viro kun longaj tremantaj manoj, mallaŭte parolis per milda kaj obtuza voĉo.

La Karinoj silente preĝis; ili ne plu pensis pri Jurij : li estis ja trankvila, dum ili devos tiom multe plu iradi laŭ malluma kaj longa vojo.

"Dio mia, protektu min... Dio mia, protektu min..." ili diris.

Nur Tatjana Ivanovna, surgenuanta antaŭ la ikono, kiu malforte brilis en la duonlumo, tuŝis per sia klinita frunto la malvarmajn kahelojn. Ŝi pensis nur pri Jurij, preĝis nur por li, por lia savo kaj lia eterna ripozo.

Post kiam la meso finiĝis, ili reiris hejmen, aĉetis freŝajn rozojn de pasanta gaja knabino kun taŭzitaĵ haroj.

Ili komencis ŝati tiun urbon kaj tiun popolon. Oni forgesis ĉiujn mizerojn en la stratoj, tuj kiam aperis la suno, kaj oni sentis sin gaja sen scii kial.

Dimanĉe la servistino havis sian liberan tagon. La malvarma manĝaĵo estis surtabligita. Ili apenaŭ manĝis. Poste Lulu metis siajn rozojn antaŭ malnovan foton de Jurij infanaĝa.

"Kiel strangan rigardon li havis!" diris Lulu. "mi neniam rimarkis... Kun iu speco de indiferenteco, de laceco... Rigardu..."

"Tian rigardon mi ĉiam vidis sur la portretoj de homoj; kiuj mortis junaj, aŭ kiujn trafos tragedia morto" flustris Cirilo kun ĝeno, "... kvazaŭ ili ĉion antaŭscius kaj fajfus prie... Kompatinda Jurij! Li estis la plej bona el ĉiuj ni..."

Ili silente kontemplis la etan paliĝintan portreton.

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio

Antaŭ du semajnoj okazis mia 45-a naskiĝa datreveno, kaj mi ne vekigis tiom bonhumora en tiu mateno. Mi iris en la kuirejon por matenmanĝi, kaj mi esperis, ke mia edzino estos gaja, diros "Feliĉan naskiĝtagon, karulo!" kaj oferos donacaĵon al mi. Tamen ŝi ne diris eĉ "Bonan matenon!", des malpli "Feliĉan naskiĝtagon!".

"Nu" – mi pensis kun mi mem – "jen la edzino kiun vi meritas! La infanoj certe memoros pri tio." Sed ili venis por la matenmanĝo kaj diris nenion. Pro tio, dum mi veturis al mia laborejo mi estis tre malgaja kaj demoralizita.

Tuj post mi eniris en mian skribejon, mia sekretariino Johana diris: "Bonan matenon, estro! Feliĉan naskiĝtagon!" Tiam mi eksentis min pli bonhumora. "Finfine iu memoris pri mia naskiĝtago!"

Mi laboris ĝis la tagmezo, kiam mia sekretariino frapis je la pordo de mia ĉambro kaj diris: "Nu, estro, hodiaŭ la tago estas tiel bela, do pro tio, ke estas via naskiĝa datreveno, mi sugestas, ke ni du tagmanĝu kune, nur vi kaj mi". "Tre bone" – mi diris al Johana – "jen la plej bona afero kiun mi aŭdis hodiaŭ. Ni iru tuj!" Ni eliris por tagmanĝi, sed ne en la ordinara

manĝejo; ni iris al pli fora loko, en la kamparo. Ni drinkis po du Martini, babilis kaj multe amuziĝis.

Dum ni veturis survoje al la laborejo, Johana diris: "Estro, la tago estas tiel bela hodiaŭ, ke ni ne devas reveni en la firmaon, ĉu ne?" Kaj mi respondis: "Nu, tio ne estas ja necesa". Ŝi do diris: "Ni iru al mia hejmo, kaj tie ni frandos plian drinkaĵon".

Kaj ni iris al ŝia hejmo. Tie mi drinkis alian Martini kaj fumis cigaredon. Poste ŝi diris: "Estro, se tio ne ĝenos vin, mi iros en mian dormoĉambron por surmeti vestaĵon pli komfortan". "Ĉio en ordo" – mi diris – "faru laŭvole."

Johana iris en sian dormoĉambron, kaj – post kvin aŭ ses minutoj – ŝi revenis el tie portante tre grandan datrevenfestan kukon, kun mia edzino kaj miaj infanoj; ĉiuj kantis "Ni gratulas al vi!"...

... kaj jen mi estis en la vizitĉambro, sidanta sur la sofo kaj vestanta nenion krom miaj ŝtrumpoj.

Aŭtoro nekonata

tradukis el la portugala lingvo

Júlio César Pedrosa el Brazilo



>>32

Rondiro la turisto deziris viziti faman vilaĝon Ŝlejerinon por vidi la turojn de la vilaĝa muro. En tiuj antikvaj tempoj kaj tiu barbara lando ne ekzistis aŭtobusoj, sed oni povis iri de loko al loko per publika kaleŝo. Iu proponis al Rondiro la turisto, ke li uzu kaleŝon numero 587, sed sur neniu kaleŝo videblis la numero. Anstataŭe sur ĉiu kaleŝo troviĝis nomo de nekonata celloko. Iu diris: „Surgrimpu ĉi tiun. Ĝi vin kondukos al Ŝlejerino.“ Surgrimpis Rondiro la turisto la kaleŝon, sed ĝi iris en la kontraŭa direkto kaj lasis lin en kampo kelkajn kilometrojn for de ĉiu vilaĝo. Li reiris al la ĉefurbo piede. Post tia longa marŝado, Rondiro la turisto sentis sin ankoraŭ pli aĝa.

Estante barbaroj, la loglanujanoj aparte amis manĝi hundaĵon, kiu estis facile havebla en ĉiu restoracio. Al Rondiro la turisto ege malplaĉis la hundaĵo kaj je ĉiu okazo li strebis eviti ĝin. Iun tagon li feliĉis kiam kelnero proponis al li pladojn „senhundaĵajn“. Avide li mendis nur „senhundaĵajn“ pladojn. Bedaŭrinde ĉiu plado enhavis do kataĵon! Post tiom da hundaĵo kaj kataĵo, Rondiro la turisto, sentis sin ankoraŭ pli aĝa.

Meze de la vizito, Rondiro la turisto, eksentis sin iom malsana, kun forte malagrabra sento en stomako kaj furioza diareo. Li serĉis kaj petis medikamenton kontraŭ diareo. Bedaŭrinde en loglana lingvo la vorto „diareo“ signifas „taglibro“ kaj la apotekisto proponis tion, ke se Rondiro la turisto suferas pro sia taglibro, li

ne plu skribu en ĝi. Tamen, li deziris vendi ion al la fremdulo kaj do proponis al la nesuspektanta Rondiro la turisto venenon kontraŭ moskitoj kaj muŝoj, ĉar ĝuste tion deziras multaj vizitantoj en Loglanujo. La veneno gustis kvazaŭ miksaĵo de ajlo kaj koto kaj inspiris en la homo viglan vomon. Post tia vigla vomado, Rondiro la turisto, sentis sin ankoraŭ pli aĝa.

Iun tagon la vetero en barbara ĉefurbo estis mirinde klara, la aero estis ĝojige freŝa kaj pejzaĝo estis glore bela. Al hazarda preterpasanto diris Rondiro la turisto: „Kia perfekta tago!“ Bedaŭrinde en la loglana ekzistas tradicia esprimo, uzata nur de ĝisostaj malamikoj: „Kia perfekta tago por via morto.“ La ŝokita loglanujano, timante tujan atakon de Rondiro la turisto, decidis, ke li plej bone tuj komencu sian sindefendon kaj kun kelkaj bubaĉoj batadis kompatindan Rondiron ĝis li ne plu certis pri la vetero. Post tia batado, Rondiro la turisto, sentis sin ankoraŭ pli aĝa.

Kiam li sukcesis reveni al Esperantujo, la haroj de Rondiro la turisto estis jam blankblankaj kaj lia dorso jam kurbiĝis kaj liaj piedoj jam hezitis, ĉar ĝuste tiom survoje li fariĝis pli aĝa.

Hodiaŭ kelkaj diras, ke ni esperantoj ŝajnas esti pli aĝaj ol aliaj personoj. Tio okazas survoje al foraj landoj kaj aparte ĉe turistoj. En Esperanto ni nomas la fenomenon „vojaĝado“.

Ujuna uzuristo pruntedonis ian monsumon al mizera kamparano. Pro la akumulitaj interezoj, tiu lasta trovas neebila repagi sian timindan kreditoron.

lun tagon, la uzuristo venas ĉe la kamparano por postuli sian monon, je kioma fojo oni ne scias. La domo estas senhoma. En la korto ludas infaneto.

Kie estas viaj gepatroj? - demandas la riĉulo.

La etulo restas senparole.

Mi demandas vin, kie estas viaj gepatroj? Gardu vin, se vi plu montrus sin obstina!

La infano tuj respondas kun tute intenca malrapideco:

Mia patro iras senkapigi la vivantajn plantojn kaj planti la mortintajn. Mia patrino iras vendi la venton!

La uzuristo longatempe cerbumas sen kompreni kion volas diri la etulo. Li vane petas tiun lastan ekspliki la sencon de tiuj paroloj.

Se vi dirus tion al mi, viaj gepatroj kvietigus kun mi! - li fine proponas kiel logaĵon.

Vi provpenas min trompi, Sinjoro!

Sed ne, honorparolo!

Kiu estos atestanto de via promeso?

La geko, kiu rampas sur la randaĵo de tiu bovlo!

Bone per la geko! Mia patro iras replanti la rizplantidojn kaj mia patrino vendi ventumilojn.

Nu, la maljuna vulpo, kiu havis la intencon nek fari donacon al la patro, nek teni sian promeson al la filo, denove postulas sian pruntedonitan monsumon.

Nenion plu vi ŝuldas al li, paĉjo, - diras la infano.

Lastan tagon, li jam solene promesis liberigi nin je la ŝuldo

Fia mensogulo! grumblas la uzuristo.

Mi havas atestanton, tion vi ne forgesu!

La maljuna avarulo iras meti plendon.

Mi ne neas la ŝuldon, - deklaras la kamparano al la mandareno-enketisto. Sed mia filo persiste asertas, ke Sinjoro la Riĉulo donis al li la promeson kvietigi nin.

La infano estas kunvokita kaj li rakontas ĉion okazintan.

Ĉu vi havas pruvon pri tio, kion vi asertas? - lin demandas la mandareno.

Mi havas atestanton!

Venigu lin ĉi tien, mensogulo! - rikanas la uzuristo.

Via Ekscelenco, - respondas la ĉiam flegma infano, tiu sinjoro mem prenis kiel atestanton la gekon, kiu rampis sur kolono de mia domo!

Li mensogas, Sinjoro mandareno! La geko estis sur la randaĵo de bovlo kaj ne sur kolono.

La mandareno, kiu scias aprezi la spritecon kaj kulturas la justecon, ekridas:

Vi perfidis vin mem, ĵurrompinta uzuristo! La vipbatoj, kiujn vi tuj ricevos, lernigos al vi respekti vian promeson, eĉ tiun donitan al infano.

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/la-atestanto/>

Vortareto

atestanto - persono, kiu, vidinte aŭ aŭdinte okazaĵon, povas atesti pri ĝi.

bovlo - larĝa, duonsfera taso el argilo, fajenco aŭ ligno.

flegma - karaktero indifera, ne ekscitebla de emocioj.

geko - rampulo el la subordo de lacertuloj, kiu per siaj speciale konstruitaj fingroj povas iri sur vertikalaj muroj kaj fenestroj.

grumbli - obtuzi murmuri pro malkontenteco.

interezo - kompenso, kalkulita en procentoj, kurante pagenda pro la fruktuzo de fremdaj valoroj, kies kapitalo estas ankaŭ repagenda je fiksita dato.

korto - sentegmenta spaco, ĉirkaŭita de konstruoj, el kiu la ĉambroj ricevas lumon kaj aeron.

logi - peni altiri al si per karesa voko, per prezento de io bongusta.

kreditoro - tiu, persono, al kiu oni ŝuldas ion.

mizero - stato, inda je kompato pro ekstrema

malriĉeco aŭ malfeliĉo.

postuli - firme esprimi sian volon, ke iu donu aŭ faru ion, kiun oni rajtas havi.

rikani - ridaĉi kun malico.

rizo - unujara tropika, marĉa herbo, grava grenspeco, 1-2 m alta, kun longaj mallarĝaj folioj, unufloraj spiketoj sur dense kunsidantaj branĉoj en 20-30 cm longa paniklo, kaj kun malmolaj tre nutraj granoj.

sprita - (iu) posedanta spiritan viglecon, kiu ebligas elpensi kaj kombini novajn neatenditajn lertajn kaj taŭgajn aranĝojn.

trompi - (iu iun) intence erarigi por sia profito aŭ por nura malico.

uzuro - delikto de iu, kiu pruntedonas monon kun interezo pli granda je duono ol la interezo kutima, aŭ pli granda ol la leĝe permesebla.

Unu rakonto el „RAKONTOJ PRAPATRAJ - pri Nia Lando Antaŭ Multaj Jarcentoj Kiam Okazemis Aferoj Mirindaj“

rakontas Doko

RONDIRO LA TURISTO

Antaŭ multaj jarcentoj, kiam la mondo estis juna, kaj kiam estis drakoj en Eŭropo, kaj kiam estis gigantoj en Azio, la turoj de la grandioza ĉefurbo de nia kara Esperantujo logis admirantojn de ĉiuj partoj de nia lando. El la nordo venis ĉasistoj, vestitaj per verdaj feloj, kiuj miris antaŭ la turoj de la urba murego, forta ŝirmilo kontraŭ la sagoj kaj kanonoj de ĉia eventuala malamiko. Ŝafistoj venis el la sudo por rigardi la belajn verdajn turojn de la reĝa kastelo. Honestaj kamparanoj venis el oriento por stari kun buŝoj malfermitaj antaŭ verdaj turoj de la centra katedralo. Bienuloj venis el la okcidento por ĉeesti spektaklojn sub la turo de la reĝa teatro. Kia granda, glora, grandioza ĉefurbo!

Ankaŭ el aliaj landoj venis vizitantoj por primiri niajn vidindajn turojn. El Volapukujo, el Interlingvujo, el Solresolujo, el Idujo, eĉ el fora Loglanujo ili venis, barbare misvestitaj, barbare misrigantaj, barbare miskomprenantaj kaj barbare misparolantaj. Ili malbone parolis nian lingvon. Ili emis osi kiam ili devis isi kaj emis isi kiam ili devis usi, kun la rezulto, ke neniu tute certis kion ili diris. Tamen ni estas popolo ĉiam tolerema eĉ al eksterlandanoj kaj do toleris ilin.

Inverse, ankaŭ niaj propraj civitanoj, scivolemaj pri la ĉirkaŭaj barbaroj, kelkfoje forlasis siajn komfortajn domojn en Esperantujo kaj vizitis la barbarajn terenojn. Inter ili, la plej fama estis la arkitekto Rondiro, kreinto de niaj famaj verdaj turoj, respektinda homo, jam de alta aĝo.

Iun jaron (kiam nia kara reĝo Ungibo estis ankoraŭ nur princo), Rondiro la turisto vizitis Loglanujon por ekzameni la historiajn turaĉojn de tiu landaĉo. Kompreneble antaŭ la aventuro li jam eklernis la loglanan, sed sovaĝan lingvaĉon apenaŭ elbuŝigeblan kiel loglanan oni nur malfacilege ellernas, kaj la loglanaj kapabloj de Rondiro la turisto estis tre modestaj. Li emis osi kiam li devis isi kaj emis isi kiam li devis usi, kun la rezulto, ke neniu tute certis kion li diris. La vortoj „antaŭ kaj malantaŭ“ estis por li iom konfuzaj en la loglana lingvo, kun la rezulto ke ofte li iris al malĝusta pordo, manĝis ĉe malĝusta tablo, aŭ pagis ĉe malĝusta giĝeto. La loglanaj numeraloj ĉiuj similis kaj li emis proponi 50 stelojn por objekto kies prezo estis nur 15.

En la loglanuja ĉefurbo li loĝis en malgranda hotelo super fama trinkejo, kiu nomiĝis La Granda Bruo. La bruego efektive estis ja miriga kaj malpermesis al Rondiro la turisto eĉ du minutojn da dormo. La duan tagon li plendis pri tio. Sed la vorto „bruo“ signifis en loglana nur „varmo“, do la hotelestro missupozis ke al li tro varmas kaj simple estingis la fajron en la hotela kameno. La duan vesperon denove la bruo malpermesis al Rondiro la turisto eĉ du minutoj da dormo kaj aldone kompatinda Rondiro la turisto preskaŭ pereis pro la malvarmo. Sed li ne kuraĝis denove plendi pri la bruo ĉar li timis eblan perdon ankaŭ de litotukoj. Post tiaj malvarmaj, bruaj noktoj, Rondiro la turisto sentis sin pli aĝa.

En la granda katedralo de la barbara ĉefurbo, Rondiro la turisto trovis belegan gastlibron kaj entuziasme subskribis ĝin. Iom strange, ĉe la supero de unu kolumno troviĝis la vorto „aĝo“. Do, Rondiro la turisto tre zorge enskribis sian aĝon en kolumnon. Bedaŭrinde la libro ne celis gastojn, sed kontribuontojn kaj la vorto „aĝo“ en la loglana signifas „donaco“. Per sia subskribo kaj aĝo, Rondiro la turisto do promesis kontribui sufiĉe grandan monsumon al la katedralo. La apuda oficisto larĝe kaj afable ridetis kiam li vidis malavaran numeron kaj postulis tujan pagon. Post tia granda elspezo, Rondiro la turisto, sentis sin ankoraŭ pli aĝa.

Tagmeze Rondiro la turisto penis aĉeti sandviĉon, sed bedaŭrinde, la vorto „sandviĉo“ en la loglana signifas „ŝuo“ kaj la kelnero supozante lin freneza, alportis nur vazon da akvo. Feliĉe la vorto „biero“ samas en Esperanto kaj en la loglana kaj eblis trinki tiom da biero kiom al li plaĉis. Sed post tri tagoj dum kiuj li englutis preskaŭ nur bieron, Rondiro la turisto sentis sin ankoraŭ pli aĝa. >>30



Solvo de la krucvortenigmo

G	E	F	I	A	N	Ĉ	O	J
O	N	I	A		E	E	K	
L	U	D		M	O			M
E		E	R	O	T	I	K	A
M	I	L	O	J	E	V	I	Ĉ
A	M	A	T	O	N	O		I
	A			S	A	L	A	T
	G	A	J	A		A	Ĝ	A
Ĉ	I	N	A		A	P	I	
	P	E	R	I	N	E	O	
	O	K	A	Z	O	N	T	A
	V	S		O		N	I	T
T	A	O		L	I	A		A

